



Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Majo 2017 n-ro: 17



14-4-2017, L. L. Zamenhof'un 100. ölüm yıldönümü, Esperanto dilinin yaratıcısı (1859-1917)

Merhaba!

Mayıs ayı sayımızla gene birlikteyiz. Bu sayımızda da birbirinden ilginç yazılar var, eğer bir kaç saatinizi bu yazılara ayırabilirseniz dilinizi geliştirmek için yardımcı olacaklarını umuyoruz.

Geçen ay 10. MONA Toplantısı Gürcistan ve Ermenistan'da gerçekleşti. Dergimizde Renato Corsetti'nin hazırladığı yazıyı ve iki genç arkadaşımızın yazdıkları notlarını bulacaksınız.

Yukarıdaki afişi, Zamenhof'un 100. ölüm yıldönümü ve Unesco birlikteliğinde kutlanan "Zamenhof Yılı" için İranlı esperantist arkadaşımız Sacad Daştı hazırladı.

Herkese iyi okumalar !

Saluton!


Ni estas denove kun vi per nia maja numero. En ĉi tiu numero estas tre interesaj artikoloj kaj se vi ŝparos kelkajn horojn por lei ilin, ni kredas, ke ili helpos plibonigi vian lingvon.

En la pasinta monato okazis la 10-a MONA Kunveno en Kartvelujo kaj Armenujo. En nia revueto vi trovos la artikolon de Renato Corsetti kaj la rimarkoj kiujn verkis niaj du junaj esperantistaj geamikoj.

La afiŝon supre preparis nia irana esperantista amiko Saĝad Daŝti por la "Zamenhof Jaro", la 100-a datreveno de la morto de Zamenhof, kiu estas solenata sub la aŭspicio de Unesko.

Bonan legadon al ĉiuj!

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



www.CDELI.org

RETEJO DE LA ASOCIO AMIKOJ DE CDELI

TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:

Esperanto (+turka)

Kodo:


Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Kultura paĝo (nova)	2
Esperanto-Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leterojn ni ricevis el geamikoj	4
Pri la 10-a Mezorianta Kunveno: floru 200 floroj	4
Mia partopreno en la 10-a Mezorianta Kunveno	5
Pri la deveno de esperantaj radikoj	6
Virinoj de la dezerto	7
Elefantino promenas en urbo	7
Estas mi Esperantisto - poemo	8
Alvoko el pasinteco - poemo	8
Japaneskoj - poemetoj	8
Ruĝkufulineto	9
Kio ni estas kaj kion ni celas (4)	10
Aperis la unua Heroldo por 2017	11
De la 99-a ĝis la 100-a UK	12
Ĉokoline	13
Dankon Amiko (4) - de Claude Piron	14
La 76-a Hispana Kongreso de Esperanto	15
Nukleenergia politiko de najbaraj landoj	16
Aparta modelo de la fotovoltaa centralo	17
Vasilij Eroŝenko - La akrvida blindula poeto	18
Turmentas hejmsopiro - poemo	19
Mallonga Historio de Filozofio (16)	20
El la libro de "Dao de Jing" (10)	21
Ŝercoj	22
Kurĉvort-enigmo	22
Gramatiko - Lingvaj Respondoj (4)	23
Kuirarto	24
48-a Itala Esperanto Kongreso	24
Du fratoj - el fabeloj de Andersen	25
Esperanto Kurso (15)	26
Honorigo de LLZ fare de Sejmo	28
Fermo	28

Kursoj



- 1) La kurso en la Lernejo Üsküdar Amerikan Lisesi en Istanbulo daŭras.
- 2) La kurso por komencantoj en Kadıköy distrikto ne okazas ĉijare.

3) La kurso por komencantoj en Celal Bayar Universitato ne okazas ĉijare.

4) Nova Kurso: En Erciyes Universitato de Kayseri urbo, 70 studentoj en la fako de Angla-instruisto, en la leciono de Lingvo akirado memlernas Esperanton kiel eksperimento pri kiel homoj lernas novan lingvon. Ĉu la bazo estas la denaska lingvo, aŭ ĉu iu alia dua lingvo ili jam lernis?

Pri tiu projekto ni publikigos detalan inform tekston en nia venonta numero.

Kultura Paĝo

Jen nova angulo en la retejo de la Turka esperantistaro Esperanto Türkiye: "**Kultura Paĝo**".

Ekde nun de tempo al tempo ni enretigos tekstojn pri la turka arto kaj literaturo. Jen ligilo al tiu angulo: <https://esperantoturkiye.wordpress.com/category/kultura-pago/>

Ne maltrafu legi la unuan ĉapitron de la libro "**Mia nomo estas Ruĝa**" de la nobelpremiita verkisto Orhan Pamuk.



Ni atendas leterojn de geamikojn



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

Esperanto-Sumoo



En la marta Esperanto Sumoo partoprenis 360 homoj, je 6 homoj malpli ol en la januara sumoo. Ni esperas, ke en majo la nombro superos 360.

El tiuj 360, 295 (81,94%) estis perfektaj venkintoj. La kvanto de legitaj paĝoj estis pli ol 20 000 (Averaĝe unu homo legas 60 paĝojn dum 15 tagoj de la Sumoo).

Koreio okupis la unuan lokon kun 98 partoprenantoj ! Gartulon al Koreio !

La nombro de la partoprenantaj landoj atingis 30. Ankoraŭ neniu partoprenis el Oceanio. Kaj bedaŭrinde neniu el Afriko, certe pro politika kaj ekonomia kialo. Novaj landoj estis Kolombio kaj Azerbajĝano, sed male malaperis partopreno el Ĉeĥio.

La partoprenantoj el Turkujo estis nur unu dum longa tempo, sed en marto 2 homoj partoprenis al la Sumoo.

La maja sumoo komenciĝos la 7-an de majo. Bonvolu aliĝu kaj legu kune kun Esperantistoj tra la tuta mondo. Tute ne timu, vi povas esti

komencanto sed vi povas partopreni per simpla libro kaj vi povas promesi legi tre malmultajn paĝojn tage eĉ nur unu paĝon.



Jen nia retejo:

<http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/index.html>

UEA



N-ro 679 (2017-04-09)

Bunta programo atendas vin dum la 46-a Malferma Tago

La stabo de la Centra

Oficejo de UEA invitas por la 46-a fojo al la Malferma Tago, kiu okazos sabaton, la 29-an de aprilo 2017, kaj tuj poste, dimanĉe, la 30-an de aprilo, okazos seminario pri informado.

Legu pli ĉe:

<https://goo.gl/rEMDQZ>

N-ro 678 (2017-04-04)

Forpasis Edwin Burg (1925-2016)

La 30-an de novembro 2016 forpasis en Hago, Nederlando, nia honora membro Edwin Burg.

Legu pli ĉe:

<https://goo.gl/Uzs4Ob>

N-ro 677 (2017-03-31)

La aprila numero de la revuo Esperanto elŝuteblas senpage

Kadre de la festado de la Zamenhof-Jaro, la unua numero de la redaktoroj Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova estas libere elŝutebla de la retejo http://revuoesperanto.org/senpage_aprila_numero dum la tuta monato aprilo.

Legu pli ĉe: <https://goo.gl/jjJLzF>

N-ro 676 (2017-03-29)

Partoprenu nian Gazetaran Kampanjon - informu pri Zamenhof kaj Esperanto

Ni invitas vin vidi la progreson de nia paĝo pri la Zamenhof-Jaro www.zamenhof.life, kiu havas allogajn informojn por la ekstera publiko en 27 lingvoj.

Legu pli ĉe:

<https://goo.gl/SRF3tW>

TEJO



La junulara movado en Nepalo

Seshimo Masayha

intervjuis Sandip Lamichhane pri la Esperantista junulara movado en Nepalo. Saluton, Sandip. Parolu pri vi! Mi estas Sandip Lamichhane kaj naskiĝis la 23-an de novembro 1997 en la distrikto Ĉitvan, kiu situas en la centra parto de Nepalo proksime al la ĉebarata landlimo. Mi eklernis Esperanton ekde oktobro 2014 kaj memstare daŭrigas. Mi [...]

Legu pli ĉe:

<https://goo.gl/jwWfCP>

Serĉata komisiito pri Scienca kaj Faka Agado

Por prizorgi la bezonojn de la junaj Esperanto-parolantoj aktivaj en la scienca kaj faka mondo TEJO serĉas respondeculon pri la komisiono pri Scienca kaj Faka Agado. La agado de la komisiono dependas de la iniciatoj de la respondeculo kaj de la jenaj bazaj orientigoj: kunigi junajn Esperantajn sciencistojn, organizi prelegsesiojn dum eventoj pri sciencaj kaj [...]

Legu pli ĉe:

<https://goo.gl/Lvz1Qu>

Intervjuo: La granda aventuro de i.d.c.

La Granda Aventuro, la nova albumo de i.d.c. / inicialoj dc, aperis en Januaro. i.d.c. / inicialoj dc estas plurlingva popa projekto de Eric Languillat, starigita en 2003 en Frankfurto ĉe Majno, Germanio. La brila nova albumo enhavas altkvalitan produktadon, interesajn tekstojn kaj unikan etoson. Aŭskultu la albumon La Granda Aventuro tie ĉi. Se vi [...]

Legu pli ĉe:

<https://goo.gl/Pgvca5>

Leterojn ni ricevis el geamikoj



Mia samideanino Elena Popova el urbo Dobrič sendis al mi elektronikan numeron de Turka Stelo. Kvankam mi estas esperantisto ekde 1958, mi ne sciis ĝis nun, ke niaj turkaj gesamideanoj eldonas revueton. Laŭ mia opinio via revuo estas tre interesa, riĉenhava kaj profesie aranĝita. Gratulojn!

Venelin Mitev, el Bulgarujo



Verdegan saluton samideano. Dankegon pro la tre bela revuo "Turka Stelo". Vian belegan revuon mi transsendis al miaj kontaktuloj en Brazilio. Sanon kaj pacon al vi.

Evandro Cabolco, el Brazilo



Bonan tagon, hazarde mi povis legi vian gazeton, kiu plaĉis al mi. Precipe du artikoloj pri "Du pinarboj" kaj tiu de Jasuo Hori.

Bonvolu aldoni mian adreson en la liston de abonantoj.

Jindřiška Drahotová el Ĉeĥio



Kara samideano, via letero ege ĝojigis kaj kortuŝis min. Antaŭ semajno sinjorino Elena Popova sendis al mi vian revuon "Turka Stelo", kiu ege plaĉis al mi. Ĝi estas ne nur interesa, riĉenhava, sed altnivela. Mi gratulas al vi. Ofte mi demandis min kial en Turkio ne estas Esperanto-movado kaj nun mi ĝojas, ke en granda lando kiel Turkio komenciĝas Esperanto-movado. Mi kore dankas al vi pri la abonigo de via revuo. Verŝajne vi scias, ke mi estas redaktoro de "Bulgara Esperantisto" kaj en la sekva numero de la revuo mi anoncos pri la "Turka Stelo". Dezirante novajn sukcesojn en Esperanto-movado. Kore via:

Georgi Mihalkov el Bulgarujo

Pri la 10-a jubilea Mezorianta Kunveno en Kartvelujo kaj Armenujo: floru 200 floroj

La longe atendata kaj longege pretigita 10-a jubilea Mezorianta Kunveno finfine okazis en la antaŭviditaj tri partoj: antaŭkunvenaj ekskursoj tra Kartvelujo, prelegoj kaj AMO-seminario en Kutaiso kaj postkunvena restado en Armenujo kun Tago de la lernanto.



Entute partoprenis 50 homoj, ne ĉiuj en ĉiuj partoj. La plej 'fremdaj' nun estis paro el Kazak-lando kaj multaj rusoj, multe pli ol en pasintaj kunvenoj. Dum la ekskursoj oni vizitis la du ĉefajn vidindaĵojn en Kartvelujo, tio estas amaso da kristanaj preĝejoj, monaĥejoj, ermitejoj kaj la naskiĝloko de Stalin. Iusence Kristo kaj Stalin estas la du ĉefaj personoj en Kartvelujo.

La prelegoj, parte en la programo AMO (aktivula maturigo) de UEA, rilatis al Esperanto en tiu regiono Kaŭkazo kun aldono de Kazak-lando, Turkujo, Irano

kaj Rusujo. Norda Kaŭkazo estis reprezentata de Abduraĥman Junusov el Dagestano. Stefan MacGill, vicprezidanto de UEA, gvidis la FLAM-analizon de la movado. Ne demandu vin pri FLAM. Ĝi simple konsistas el la komencliteroj de Fortoj, Lamaĵoj, Avantaĝoj, Malavantaĝoj. Temas pri skemo, laŭ kiu oni povas analizi kiun ajn situacion, ankaŭ tiun de la Esperanto-movado.

Estis nur unu ĝenerala konkludo: venis la momento por internacia kunlaborado inter la esperantistoj de la najbaraj landoj en tiu regiono: Kartvelujo, Armenujo, Turkujo kaj Irano. Oni forgesu la miljarajn kaj lastatempajn barojn kaj kuraĝe interŝanĝu vizitojn, ankaŭ laŭeble kun Azerbajĝano, partoprenu la aranĝojn organizitaj de esperantistoj en tiuj landoj, asertu sian ekziston kiel regiona movado.

Tute apartan pritrakton bezonus la staton de la armena movado. Ni renkontis la erevanajn esperantistojn, kaj Anna Lowentein komentis, ke ilia



grupo estas multe pli forta ol la Esperanto-grupo en Londono. Tio montras, ke en Erevano malgraŭ ĉiuj problemoj la Esperanto-agado estas vigla ankaŭ kompare kun okcidenteŭrpaj landoj. Pri tio ni povis plene konvinkiĝi dum la ekskurso kaj la prelegoj de la 'Tago de lernanto'.



Esperable ni sukcesos altiri la atenton de esperantistoj al ĉi tiuj landoj kaj la ties aranĝoj.

Mia persona konkludo estas, ke devas flori 200 floroj, alivorte ke en ĉiuj landoj de la mondo (proksimume 200) devos esti bona nombro da parolantoj de Esperanto. Sen tio en Roterdamo oni povas daŭre bati sian kapon kontraŭ la muro pri la falo de la membronombro, sed neniu solvo aperos. Esence oni devas reorienti sian atenton al la tuta mondo kaj se en Irano la agado estas pli promesoplena ol en

Nederlando oni devas doni atenton al ĝi. Oni ankaŭ devas laŭcele orienti sian agadon al pliigo de la parolantoj en landoj sen parolantoj de Esperanto. La tuta Centra Azio, ekzemple, bezonas tian agadon. Kiel mi deklaris en la kunveno Centra Azio estas teritorio forlasita de Dio kaj de Marks kaj atentata nur de Usono kadre de ĝia 'milito' al Rusujo.


Iom povas helpi la nove enretigita kurso en la rusa <http://www.gazetaro.org/mamutido>, kiu estas proponata al ĉiuj rusparolantaj centraziaj. Male ol tio, kion asertas la Fundamento, rusoj ne loĝas nur en Rusujo sed multaj el ili loĝas en Centra Azio.

Laŭ la nunaj antaŭvidoj la estonta Mezorianta Kunveno devus okazi en Maroko.

Renato Corsetti




Mia partopreno en la 10-a Mezorianta Kunveno



Ĉijare en la komenco de aprilo estis organizita la 10-a Mezorianta Esperanto Kunveno (MOK). Esperanto estis kreita por ke la problemo de lingva komunikado povus esti solvita. Kvankam la parolantoj de Esperanto

estas malplimultaj, kiam mi partoprenis en la 10-a Mezorianta Kunveno ĉi tiu jaro, mi komprenis ke Esperanto vere helpas nin pri la problemo de komunikado. Mi vidis ke la diverseco inter homoj kaj iliaj kulturoj ne gravas kiam ili estas kunigintaj per Esperanto. Ĉi tiu jaro la Mezorianta Kunveno okazis en Kartvelujo. Do dum la kunveno, mi aŭskultis prelegojn de samideanoj, babilis en Esperanto kun miaj novaj geamikoj, kaj ankaŭ promenis en la belaj stratoj de Kutaisi kaj Tbiliso. Mi kredas, ke kunvenoj de Esperanto evoluigas min, ĉar ili estas mirindaj spertoj. Mi esperas ke mi povas partopreni en la venontaj kunvenoj kaj plibonigi mian Esperanton.

Öykü Zümra Mete



Farklı ülkelerden birçok insanın bir araya geldiği 10. Orta Doğu Esperanto Konferansı benim için muhteşem bir deneyimdi. Daha önceki konferanslarda tanıştığım arkadaşlarıma kavuşurken çeşitli kültürlerden birçok yeni insanla da Esperanto sayesinde tanışma fırsatı buldum. Konferans boyunca yapılan sunumların ve yeni tanıştığım insanlarla ettiğim sohbetlerin yanı sıra konferansın bu sene gerçekleştirildiği ülke Gürcistan'ı gezmek de çok keyifliydi. Farklı kültürleri tanırken eğlendim ve eğlenirken dünyanın birçok farklı ülkesinden gelen insanları birleştirmeyi amaçlayan dünya dili Esperanto'yu konuşarak pekiştirdim. Gelecek sene de bu maceranın bir parçası olmak için sabırsızlanıyorum.

Bora Elçi

En Esperanto estas ĉefe radikoj de latinidaj lingvoj, sed ankaŭ estas multaj aliaj radikoj el la aliaj eŭropaj lingvoj (ekz. angla, germana, slavaj lingvoj kaj eĉ greka). Tiu ja estas komprenebla afero ĉar Zamenhof scipovis tiujn lingvojn kaj en lia tempo tiu estis lia proksima mondo. Se vi pensas ke ne estis telefonoj, televidiloj, tutmonda komunikado ktp tiu ja estis normala afero.

Estis bona demando en Esperanto facebook-a grupo pri tio, kaj la demandanto plue demandis se oni pensas aldoni pluajn vortojn el la diversaj mondaj lingvoj (ekz. hindia, japana, ĉina, afrikaj lingvoj ktp).

Jen ligilo al ĉi tiu facebook-a afiŝo kaj diskuto:

<https://web.facebook.com/groups/esperanto.grupo/permalink/10154949430320289/>

Ĉu vi uzas la vortaron **PIV** (Plena Ilustrita Vortaro) kies ĉefa redaktisto estis **G.Waringhien** kaj kiu ekde kvar jaroj ekzistas ankaŭ en la reto, libere uzebla, dank'al la projekto de **E@I**?

Rigardu la paĝon de **E@I** :

<http://www.ikso.net/eo/projektoj/index.php>

kaj jen la ligilo de la reta **PIV**-o :

<http://vortaro.net/>

Se vi uzas ĉi tiun vortaron, vi certe rimarkis, ke kiam vi serĉas vorton, antaŭ vi ekaperas preskaŭ la tutaj diversaj vortoj, kiujn oni povas formi per la radiko de la vorto vi serĉas. Kaj la unuan lokon okupas la baza radiko. Vi ankaŭ eble rimarkis ke estas signoj en tiu baza radiko, kiel steleto "*" kiu signifas, ke tiu radiko estas el la listo de la fundamentaj radikoj. Anstataŭ steleto povas esti ankaŭ numeraloj, kiuj montras la numeron de anonc-listo de "**AdE**" aŭ la "**Akademio de Esperanto**" per kiu, tiu vorto estis aprobita kaj tiel oficialigita. Sed aparte de tio estas radikoj kiuj havas nek steleton nek numeralon, ekzemple la vorto "**kontempli**". Ĉi tiuj vortoj ne estas oficialaj vortoj de Esperanto. Ilin iam eble uzis Zamenhof aŭ iu alia grava esperantisto ie en iu teksto aŭ en iliaj paroladoj aŭ ili estis vortoj, kiujn diversaj esperantistoj iam uzis kaj ili ankoraŭ estas uzataj, tamen ne tiel ofte.

Mi persone pensas, ke Esperanto estas preskaŭ kompleta lingvo, kiu havas ĉiujn radikojn bezonatajn por esprimi preskaŭ ĉion. Plue en Esperanto jam estas multaj vortoj, kiujn altrudis tiuj, kiuj ne bone scias la lingvon aŭ ĉefe la angla kaj franca parolantoj kiuj volas eble esprimi nuancajn signifojn kiuj ne ekzistas en Esperanto. Ekzemple la vorto "**kontempli**"

estas tia vorto, kiun eble altrudis angloj. Sed ĉu en ĉiu lingvo estas la ekvivalento de tiu signifo? Plej eble estas aliaj unu-du vortoj aŭ eble kunmetitaj vortoj, kiuj donas la saman signifon. Ekzemple en Esperanto por "**kontempli**" ni povas uzi la vortojn "**medite konsideri**", "**admire aŭ ravite rigardi**" ktp.

Nia lingvo ne bezonas multajn radikojn, kiel estas la kazo en aliaj lingvoj. Esperanto devas esti simpla kaj do facile lernebla, kaj pro tio ĝiaj radikoj devas esti malplimultaj ol la aliaj lingvoj. Se ni plenigus ĝin per superfluaĵoj, tiam ĝi ne estus facile lernebla.

Mi volas atentigi vin pri "**la bona lingvo grupo**", kiu funkcias kiel kvazaŭ faka lingva-branĉo de AdE, kies membroj estas spertaj esperantistoj, kiuj klopodas trovi rimedojn al tiaj vortoj. Ili sugestas alternativojn kaj la rezultoj estas registritaj en la retejo "**bonalingvo.net**". Jen ligilo al tiaj vortoj kiuj komencas per litero "**k**" :

http://bonalingvo.net/index.php/Ssv:_K

Bonvolu provi trovi la vorton "**kontempli**" en ĉi tiu paĝo. Plue tiujn vortojn oni regule kaj preskaŭ ĉiutage anoncas en diversaj retpoŝt-grupoj kaj facebook grupoj.

Kiam vi verkas kaj serĉas taŭgan vorton por via teksto, kiu tamen ne estas fundamenta aŭ aprobita de AdE, tiam rigardu en tiu retejo por ke vi trovu alternativon por beligi, simpligi, kaj fari vian tekston vere esperantan. Laŭ mi estus bone se oni, eble **E@I**, ankaŭ enretigus vortaron de sinonimaj vortoj por helpi tiujn, kiuj verkas esperantajn tekstojn.

Nun, se ni revenas al nia antaŭa kaj unua temo pri novaj vortoj el aliaj lingvoj, mi devas ripeti, ke Esperanto jam estas preskaŭ kompleta lingvo, kiu ne bezonas pluajn novajn vortojn. Certe, ke vortoj propraj al iu lingvo eniras kaj eniros Esperanton en siaj propraj formoj, kompreneble laŭ la regulojn de nia lingvo. Ekzemple "**suŝio**" estas japana kaj jam internacia vorto, do tiaj vortoj rekte eniris kaj eniros nian lingvon. Ankaŭ povas esti vorto tute ne internacia sed propra al tiu lingvo kaj mondo parto, do ĝi povas esti uzota rekte en Esperanto.

verkis: **Vasil Kadifeli**

Virinoj de la dezerto



Estas nuba vetero sed post malonga tempo aperas subite la suno... kelkaj sunradioj sukcesas briligi la ŝtonojn sur la longa kaj mallarĝa vojeto... la vojeto pasas inter montoj... tiun ĉi vojeton uzas nur monaĥoj kaj monaĥinoj... du monaĥoj piediras sur tiu ĉi longa vojeto dum preskaŭ tri horoj... ili revenas al ilia monaĥejo kiu troviĝas post ses-hora plua piedirado... ili portas pezajn dorsosakojn... la vojeto deklivas apud bela klifo... sinjoro Jesuo Kristo kompatu min... sinjoro Jesuo Kristo kompatu min... iliaj lipoj daŭre ripetiĝas tiujn vortojn... ili ne sentas lacecon... ilia preĝo faras ilin pli fortaj...

Blovas la vento kaj la nuboj kaŝas la sunon... ŝajnas ke estas pluvo sed ne pluvas... plua blovo de vento movas aparte la du densajn nubojn kaj reaperas la



Georgos Leventidis el Tesaloniko

suno... la forta sunlumo helpas ilin vidi malproksimen sur la kontraŭa monto... estas du aliaj monaĥoj kiuj promenas sur la sama vojeto kaj venas al ilia direkto... kiam ili proksimiĝas ili vidas pli klare... tiuj du monaĥoj ne portas dorsosakojn... ili estas malpli dikaj... ili alproksimiĝas pli kaj nun ili vidas la aliajn pli klare... ili estas du monaĥinoj... la du monaĥoj vidante ilin, tuj eliras la mallarĝan vojeton kaj lasas lokon por ke la monaĥinoj pasu facile... la du monaĥoj ankaŭ salutas la monaĥinoj... sed la plej aĝa monaĥino ĝeniĝas kaj riproĉas ilin... ŝi diras: se vi estus bonaj monaĥoj, vi eĉ ne devus vidi nin, bonaj monaĥoj ne vidas ĉu la aliaj estas monaĥoj aŭ monaĥinoj, ili eĉ devas movi la kapojn al la alia flanko...


Verkis **Georgos Leventidis** el Tesaloniko

kiu inspiriĝis el la libro

VIRINOJ DE LA DEZERTO

de Pandelis V.Pashou

Elefantino promenas en urbo



Meze de granda urbo troviĝis eta bestoĝardeno kaj tie vivis tre juna elefantino. Ŝi nomiĝis

Roza. La bestoprizorganto tre amis Roza kaj atentis ke nenio manku al ŝi. Multaj vizitantoj venis por vidi Roza kaj rigardis kun ravo kiel ŝi sukcesis manĝi dekon da bananoj samtempe! Roza estis bone prizorgata, sed mankis al ŝi la kunestado kun aliaj elefantoj.

Iun tagon, post kiam li donis manĝaĵon al Roza, la prizorganto forgesis fermi la pordon de ŝia kaĝo. Tuj ŝi eliris el la bestoĝardeno! Unue ŝi ekvidis vendiston de glaciaĵoj ĉe la rando de strato. Li vidis Roza kaj forkuris. La scivolema elefantino metis sian rostron en

Facila legaĵo

la glaciujon. En ĝi estis io tiom malvarma, sukera, bongusta ke ŝi decidis engluti la tuton.

Poste ŝi daŭrigis sian esploradon provante trovi iun. Finfine ene de vendejo ŝi ekvidis aron da elefantoj sur televidekrano! "Amikoj!" ŝi pensis kaj eniris la televidvendejon. Ĉiuj ene de la magazeno elkuris lasante ŝin tute sola. Roza provis paroli kun la elefantoj sur la televidekrano sed ili ne respondis. Konfuzita kaj elrevigita ŝi elpaŝis.

Ekstere ŝi vidis vendiston de kokosnuksoj. "Kiom bone! Mi trovis pilkon! Jen mi povos ludi nun!" ŝi kriis kaj piedfrapis kokosnukson kiu iris alten en la ĉielon. Ĝi flugis trans la straton kaj surteriĝis tuj apud knabeto, kiu ludis en la parko. Roza kuris trans la straton por rehavi sian kokospilkon. Aŭtobremiloj grincis, busoj hupis kaj stirantoj ekinsultis unu la alian. Roza kaŭzis trafikŝtopiĝon. Policistoj alvenis por regi la situacion. Luj informis la bestoĝardenon.

Ne konsciante pri la problemoj kiujn ŝi kreis, Roza simple kuris en la parkon. Ŝi haltis antaŭ la knabeto kiu ridetis al ŝi. Li ekscitiĝis kaj karesis la elefantinon. Roza ellasis laŭtan sonon por montri kiom kontenta ŝi estas pro la trovo de nova amiko. Intertempe la bestoprizorganto alvenis en la parkon. Vidante Roza en la granda parko, li komprenis ke ŝi neniam estos feliĉa en kaĝo.

La bestoĝardenistoj sendis Roza al protektita arbaro, for de la urbo, kie multaj aliaj elefantoj libere vivis. Roza kreskis kaj feliĉis. Ekde tiam anstataŭ ol rigardi Roza tra stangoj en eta kaĝo la vizitantoj povas vidi ŝin inter multaj arboj. Ŝi ankoraŭ englutas dekon da bananoj samtempe.

Fonto: Rakonto de Amit Garg en Bookbox

ESTAS MI ESPERANTISTO

Poemo de Julio Baghy



Verda stelo sur la brusto
iom palas pro la rusto.

Mi ne estas purigisto;
estas mi esperantisto.

Kuŝas ie sub tegmento
"Netuŝebla Fundamento".

Tuŝu ĝin nur la Mefisto;
estas mi esperantisto.

Polvkovrite sur bretaro
putras mia SAT-vortaro.

Tedas min la vorto-listo;
estas mi esperantisto.

Gramatikon mi ne konas
kaj gazeton ne abonas...

Librojn legu la verkisto;

estas mi esperantisto.

Mi parolas kun rapido:
"Bonan tagon! Ĝis revido!"

Ĝi sufiĉas por ekzisto;
estas mi esperantisto.

Pionirojn mi kritikis,
la gvidantojn dorne pikas
kaj konspiras kun persisto;
estas mi esperantisto.

Por la venko mi esperas,
sed nenion mi ofertas.

Mi ne estas ja bankisto;
estas mi esperantisto.

Se baraktas en la krizo,

la movado, organizo
helpas mi nur per rezisto;
estas mi esperantisto.

Flugas per facila vento
el la buŝo Nova Sento.
Ĝi sufiĉas por sofisto;
estas mi esperantisto.

Post la mort' ĉe tombo mia
staros "rondo familia",
nekrologos ĵurnalisto:
estis li esperantisto.

Fonto: La Balta Ondo
<http://sezonoj.ru/2017/03/ba-ghy-2/>

ALVOKO EL PASINTECO

Poemo de Angel Arquillos



Kiu vokas min
de l'pasinteco?

Mi la vortojn
ne distingas,
embarasita mi estas
kun mia mens'

kortuŝita,
ĉar mi sidas
sur la kanapo de l'vivo
meditante

pri malĝojo
kaj feliĉo,
sed la voĉo
de l'pasinto
daŭre vokas
kun insisto
kaj petegas mian helpon.

Kion fari?
Kie estas la paseo?
Kie estas la mistero?

Mi tre solas
sur la kanapo de l'vivo
mi deĵoras
kaj atendas la momenton
retrovi la pasintecon
kaj rekuperi la vivon.

Angel Arquillos
Febraro 2017

JAPANESKOJ

Poemoj de Maria Nazaré Laroca



Tasko
Reen kaj reen,
ĉevalaro el ŝaŭmo,
la ondoj kuras...
Destin' melankolia:
la disfandiĝ' sursabla.

Festo
Mev' akrobatas,
eksaltas gajaj fiŝoj...
Jen la maro pludancas!
La penso kapriolas,
L'animo ekferias.

Flirto
La somerluno
ĉiele mateniĝas
por rendevuo...
Ĉu vane? Ĝi atendas
almenaŭ foran kison.

Maria Nazaré Laroca
Cabo Frio, 29/12/2015
<http://nazarelaroca.blogspot.gr/2015/12/japaneskoj.html>



Iam vivis vilaĝa knabino, la plej bela, kiun oni povis vidi; Ŝia patrino ĝojegis pro ŝi, kaj ŝia avino ankoraŭ pli. Tiu bona virino farigis por ŝi ruĝan kufeton, kiu tiel bone sidis al ŝi, ke ĉie oni nomis ŝin Ruĝkufulineto.

Lun tagon, kuirinte kaj farinte bulkojn, ŝia patrino diris al ŝi: "Iru al via avino por vidi, kiel ŝi fartas, ĉar oni diris al mi, ke ŝi estas malsana, portu al ŝi bulkon kaj tiun poteton da butero."

Ruĝkufulineto tuj foriris al sia avino, kiu loĝis en alia vilaĝo. Pasante tra arbaro ŝi renkontis grandan lupon, kiu tre deziris ŝin manĝi; sed ĝi ne aŭdacis pro tio ĉar en la arbaro troviĝis iuj arbohakistoj. Ĝi demandis ŝin, kien ŝi iras; la malfeliĉa infano, kiu ne sciis, ke halti por aŭskulti lupon estas danĝere, diris al ĝi:

- Mi iras por vidi mian avinon, kaj porti al ŝi bulkon kaj poteton da butero, kiujn sendas al ŝi mia patrino.

- Ĉu ŝi loĝas tre malproksime? Demandis ŝin la lupu.

- Ho jes! Respondis Ruĝkufulineto, ŝi loĝas trans la muelejo, kiun vi vidas tie en la malproksimo, ĉe la unua domo de la vilaĝo.

- Nu bone! diris la lupu, ŝin viziti ankaŭ volas mi; mi ekiros laŭ tiu ĉi vojo, kaj vi laŭ la alia, kaj ni vidu, kiu el ni ambaŭ alvenos la unua.

La lupu tuj ekgalopis per sia tuta forto laŭ la vojo, kiu estis la pli mallonga, dum la knabino ekiris laŭ la pli longa vojo, amuziĝante pluki avelojn, kuri post la papiliojn, kaj fari al si bukedojn el la etaj floroj, kiujn ŝi trovis. Al la lupu longa tempo ne estis necesa, ĝis ĝi alvenis al la domo de la avino; ĝi frapis: Tok, tok.

- Kiu estas tie?

- Estas via nepino Ruĝkufulineto (respondis la lupu, ŝanĝante sian voĉon), kiu alportas al vi bulkon kaj poteton da butero, kiujn sendas al vi mia patrino.

La bona avino, kiu kuŝis en sia lito pro tio, ke ŝi fartis iom malbone, kriis al ĝi:

- Tiru la ŝnureton, kaj la klinketo falos.

La lupu tiris la ŝnureton, kaj la pordo malfermiĝis. Ĝi ĵetis sin sur la bonan virinon, kaj formanĝis ŝin per malpli ol unu gluto; ĉar jam de pli ol tri tagoj ĝi nenion manĝis. Poste, ĝi fermis la pordon, kaj iris kuŝiĝi en la lito de la avino, atendante Ruĝkufulineton, kiu post momento venis frapi sur la pordon. Tok, tok,

- Kiu estas tie?

Aŭdinte la raŭkan voĉon de la lupu, Ruĝkufulineto ektimis, sed pensante, ke la avino malvarmumis, ŝi respondis:

- Estas via nepino, Ruĝkufulineto, kiu alportas al vi bulkon kaj poteton da butero, kiujn sendas al vi mia patrino.

La lupu kriis al ŝi, iom mildigante sian voĉon:

- Tiru la ŝnureton, kaj la klinketo falos.

Ruĝkufulineto tiris la ŝnureton, kaj la pordo malfermiĝis. Vidante ŝin eniri, la lupu diris al ŝi kaŝante sin sub la litkovrilon:

- Metu la bulkon kaj la poteton da butero sur la pankeston, kaj venu kuŝiĝi apud min.

Ruĝkufulineto senvestiĝis, kaj iris en la lito, kie ŝi tre miris vidante, kiel aspektas la avino senvesta. Ŝi diris:

- Mia avino, kiajn grandajn brakojn vi havas!

- Por plej bone ĉirkaŭpreni vin, mia nepino.

- Mia avino, kiajn grandajn krurojn vi havas!

- Por plej bone kuri, mia infano.

- Mia avino, kiajn grandajn orelojn vi havas!

- Por plej bone aŭdi, mia infano.

- Mia avino, kiajn grandajn okulojn vi havas!

- Por plej bone vidi, mia infano.

- Mia avino, kiajn grandajn dentojn vi havas!

- Por vin manĝi.

Kaj dirinte ĉi tiujn vortojn, la malbona lupu ĵetis sin sur Ruĝkufulineton, kaj ŝin formanĝis.

originala titolo : Le Petit Chaperon rouge
el francigis : Dominik CORNICE

Vortareto		muelejo	deĝirmen
arbohakisto	oduncu	nepino	torun
aŭdaci	cesaret etmek	pankesto	ekmek kutusu
avino	nine	papilio	kelebek
bukedo	demet	pluki	kopartmak
bulko	köfte	poteto	kapçık
ĉirkaŭpreni	sarılmak	raŭka	kısık
ekgalopi	dörtнала koşmaya	ruĝkufulineto	kırmızı başlıklı
	başlamak		küçük kız
gluto	lokma	senvestiĝi	soyunmak
halti	durmak	ŝnureto	küçük ip
klinketo	küçük mandal		
lupu	kurt		
malproksimo	uzaklık		
malvarmumi	üşütmek		
mildigante	yumuşatarak		

KIO NI ESTAS KAJ KION NI CELAS (4)

4. Plurlingveco

RENATO CORSETTI Psiĥolingvisto

La Esperanto-komunumo estas unu el malmultaj mondskalaj lingvokomunumoj kies parolantoj estas senescepte du- aŭ plurlingvaj. Ĉiu komunumano akceptis la taskon lerni almenaŭ unu fremdan lingvon ĝis parola grado. Multokaze tio kondukas al la scio de kaj amo al pluraj lingvoj kaj ĝenerale al pli vasta persona horizonto.

Ni asertas ke la anoj de ĉiuj lingvoj, grandaj kaj malgrandaj, devus disponi pri reala ŝanco por alproprigi duan lingvon ĝis alta komunika nivelo. Ni estas movado por la provizo de tiu ŝanco.

Kiam oni renkontas fremdulon, unu el la kutimaj demandoj estas: "Kiun lingvon vi parolas?" En ĉi tiu laŭŝajne senkulpa demando estas kaŝita tuta resumo de la ideologia evoluo de okcidenta Eŭropo (kaj ne nur ĝi) dum la lastaj jarcentoj.

En okcidenta Eŭropo laŭgrade dum la formiĝo de la grandaj modernaj ŝtatoj formiĝis la ideo ke la ideala civitano estas unulingva parolanto de la sama lingvo, kiun parolas la reĝa kortego. Ja, certe, ĉiuj sciis ke multaj el la civitanoj, ekzemple la kamparanoj, parolas malsame ol la reĝo, sed aliflanke tiuj ne estis modelaj civitanoj, kaj oni devis labori por igi ilin kiom eble plej similaj al modelaj civitanoj.

En la grandaj imperioj de la antikveco, ĉiuj akceptis la fakton ke la subuloj estas plej malsam-specaj kaj ke ili parolas siajn lingvojn. Tio ĝenis neniun, ĉar tio estis parto de la vivo. Kompreneble se oni volis paroli kun fenikaj komercistoj, oni devis lerni la fenikan, aŭ ili devis lerni la lokan lingvon. Kompreneble se oni volis aŭ devis iĝi soldato en la turka armeo, oni devis aldoni la turkan al sia lingva repertuaro; aŭ oni ne povis iĝi katolika pastro se oni ne lernis la latinan.

Ĉi tiu relative tolerema vidpunkto malaperis kun la ekesto de la grandaj eŭropaj ŝtatoj. Eĉ la postaj revolucioj, ĉefe la franca, ne forigis ĝin. Male, oni emfazis la fakton ke egalaj civitanoj devas esti egalaj pri ĉio, inkluzive de la lingvo. Aliflanke, faktoj estas ofte pli obstinaj ol teorioj. Se oni rigardas la mondon nun, oni vidas ke granda parto (la plej granda laŭ pluraj lingvistoj) de la homaro estas nature plurlingva. Oni parolas unu lingvon hejme kaj alian lingvon en la bazaro, en la oficejo aŭ en la preĝejo. Kutime tio ne

kaŭzas problemojn, se ne ekzistas premoj de unu grupo altrudisian lingvon kaj malpermesis la lingvon de alia grupo. En la lastaj jardekoj ankaŭ studentoj el teorie unulingvaj landoj komencis demandi sin ĉu tiuj politikoj, kiuj celas forigi la lingvan



François Rude:

Marsejzo, 1833-36

malsamecon interne de landoj, estas justaj kaj ĉu ili estas efikaj (en kelkaj landoj oni pretas akcepti maljustaĵojn se ili havas la sekvon porti efikecon).

La problemo estas pli aktuala ol ĉiam pro pluraj lastatempaj fenomenoj. Unuflanke la nova komunika teĥnologio ebligas pli kaj pli da trans-lingvolimaj kontaktoj, kaj aliflanke la grandaj migrado-ondoj portas ĉiutage homojn de unu lingva teritorio al alia.

Kion ni devas alstrebi en ĉi tiu situacio?



Cornelis Anthonisz. Teunissen: *La detruo de la Babela Turo, 1547.*

La pledantoj por efikeco je ĉia kosto postulas ke oni

devigu (se necese per leĝoj kaj polico, aŭ simple per ekonomia forto) unuflanke la parolantojn de malfortaj lingvoj rezigni entute pri siaj lingvoj almenaŭ en kelkaj kampoj (litovoj, danoj, nederlandanoj, turkoj, japanoj kaj multaj aliaj devus simple lerni la lingvon de la fortuloj en la unuopaj kampoj de la internacia vivo), kaj aliflanke la enmigrintoj devus kiel eble plej rapide forgesi sian hejman lingvon, se eble ankaŭ sian hejmlandon, kaj iĝi modelaj civitanoj de la akceptantaj landoj.

La lingvistoj kaj la pledantoj por justaj rilatoj inter la homgrupoj malkovras ĉiutage kiom malfacile estas plenumi la ĉisupre prezentitajn ideojn. En internaciaj rilatoj la potencopesilo daŭre ŝanĝas sian pozicion. Popolo, kiu nur hieraŭ ŝajnis destinita je malapero aŭ daŭra postlamado de aliaj, abrupte iĝas potenca kaj asertas siajn rajtojn (ankaŭ lingvajn). La nuna situacio ne estas eterna, kvankam ĝi povas ŝajni al ni, samtempuloj, tia. Se en la jaro 2050 Usono havos la hispanan kiel la plej uzatan lingvon, kion faros ĉiuj nunaj pledantoj por la angla kiel internacia lingvo?



“... oni remalkovras ke homoj povas esti du- aŭ plur-lingvaj, kaj ke tio ne aŭtomate alportas katastrofojn...”

En enŝtataj situacioj oni daŭre malkovras ke la fandopolitikoj ne estas sendoloraj kaj senkostaj. Eĉ pluraj situacioj, kiuj ŝajnis dumeterne solvitaj, en la lastaj jardekoj montriĝis ne esti tiaj. Kiu, ekzemple, antaŭvidus antaŭ kvindek jaroj, ke irlandanoj rekomencos lerni kaj paroli la irlandan en Dublino?

Fronte al ĉi tiuj okazaĵoj ankaŭ en la tradiciaj lingve unuismaj landoj oni remalkovras ke homoj povas esti du- aŭ plurlingvaj, kaj ke tio ne aŭtomate alportas katastrofojn. La babilonaj imperiestroj, kiuj sciis tion, verŝajne ridetas el la transmondo.

ĉiu esperantisto estas almenaŭ dulingva

Sed ankaŭ esperantistoj rajtas rideti. La Esperantomovado, fakte, konsistas el homoj kiuj senescepte estas almenaŭ dulingvaj. Ne rezignante pri sia lingvo, ili lernis kaj komencis paroli alian lingvon. La mondkonaj sekvoj de tio estas klaraj al ĉiuj parolantoj de Esperanto, sed tre malfacile klarigeblaj al unulingvuloj - ĉefe al tiuj kiuj provis dum jaroj lerni fremdan lingvon, sed ne atingis eĉ la nivelon necesan por mendi kafon senprobleme. Per Esperanto ni volas doni ankaŭ al ili la praktikan eblon iĝi dulingvulo.

(daŭrigota)

KIO NI ESTAS KAJ KION NI CELAS
Komentoj pri la Manifesto de la movado
por la internacia lingvo.
Publikigita de UEA, Rotterdam 1999

Aperis la unua Heroldo por 2017

Hodiaŭ, la 8an de aprilo aperis en la reto la unua numero de Heroldo de Esperanto por la jarkolekto 2017. La originala plano de la Sociala Grupo Lexus, kiu pasint-jare aĉetis Heroldon de LF-koop, estas eldoni 20-paĝan gazeton, sed la unua numero estas nur 12-paĝa. Laŭ la vortoj de la redakcia direktoro de Heroldo, brazilano Fabricio Valle, la dua numero havos 16-paĝojn kaj ekde la tria ĝi estos 20-paĝa gazeto.

Fondita en 1920 de Teo Jung, Heroldo de Esperanto en la 20a jarcento estis unu el la plej popularaj Esperanto-gazetoj, sed en la lastaj dudek jaroj ĝia legantaro ŝrumpis. Por repopularigi ĝin, la novaj eldonistoj decidis, ke Heroldo fariĝu “vehiklo de pripensado kaj pripensigado pri la mondo”. La titolpaĝa devizo “Ni pripensas la mondon” montras la novan direkton de la malnova gazeto

La unua numero, kiu estas laŭvice №2268, de Heroldo de Esperanto estas senpage legebla kaj elŝutebla en la retejo <http://bit.ly/HdE-nro1-2017>

Fonto: Novaĵretejo La Balta Ondo
<http://sezonoj.ru/2017/04/heroldo-7/>

De la 99-a ĝis la 100-a, rakonteto pri partopreno en Universala Kongreso



MARIA ENIRIS LA TEATRON por ĉeesti la solenan fermon de la 99-a Universala Kongreso de Esperanto (UK)... ŝi estis ĝoja, feliĉa, emociita... Kiam oni partoprenas UK-n, oni spertas diversajn

emociojn, lernadojn, sciadojn, aventurojn, ludojn, kantojn kaj tiel plu... Tiam, ĉio, kion ŝi spertis dum la pasintaj tagoj, plenigis ŝian menson... ŝi piediris serĉante senokupan seĝon kaj ŝi sentis sian koron batanta maltrankvile... La fermo okazos baldaŭ, sed ankoraŭ restas kelkaj minutoj... Sidinte, ŝi ekvidis la ĉeestantojn...

Dekstre malproksime estas Mina, el Barato, ŝi instruas Esperanton al infanoj kaj, kiam María konis ŝin dum la matenmanĝo merkrede, ili multe babilis pri siaj laboroj en la disvastigado kaj instruado de Esperanto, kaj ili planis helpi unu al la alia. Fakte, ili jam planis kunsidon, pere de la reto, por la praktikado de la babilado inter siaj gelernantoj.

María nun rekonas Béla-n, el Hungario, li sidas maldekstre. María konis lin post la solena inaŭguro de la kongreso, kiam ili kune piediris al la hotelo kaj dume ili tre agrable babilis pri la inaŭguro. Bonŝance, ili gastis samhotele. Do, ili ĉiutage noktomanĝis kune... María multe lernis pri la historio de Hungario, ĉar Béla estas profesoro de historio. Béla ankaŭ promesis al ŝi sendi esperantajn rakontojn por ŝiaj gelernantoj... Béla estas tre agrabla kaj María multe sopiris babilu kun li. Certe dum UK-j oni trovas tre bonajn geamikojn!

Kelkaj vicoj supre estas Ahmed, el Irano. Dum la unua tago de la kongreso, María trovis lin en la libroservo kaj sciis ke Ahmed ĉeestos la KER-ekzamenon kiel ŝi, do ili multe parolis pri la KER-ekzamenoj, pri la instruado de Esperanto en siaj landoj kaj pri la disvastigado de la lingvo; Ahmed invitis María-n al Irano por partopreni la nacian kongreson. Ankaŭ ili multe ĝojis la kunvivadon dum la kantado de "La Espero" kaj María multe deziras daŭrigi la babiladon kun Ahmed... sed la kongreso preskaŭ finiĝas! Ŝi sentos la mankon de siaj novaj geamikoj.

Unu vico sube estas Terezinha, el Brazilo, kaj Irina, el

Britio. María, Terezinha, Irina, Sergey (el Ukrainio), Xiao (el Ĉinio) kaj Emile (el Sud-Afriko) kune promenis tra la urbo kaj disdonis informilojn pri la Internacia Lingvo... Ili multe ĝojis, ridis, interparolis kun la urbanoj, konis la urbon kaj eĉ lernis iomete pri la nacia lingvo! Ili petis al María resti en kontakto... kaj ŝi faros tion!

Irina estas psikologino kiel María kaj deziras daŭrigi siajn profesiajn studojn en Meksiko, do María serĉos informojn por ŝi kaj sendos ilin al ŝi. Se Irina studus en Meksiko, ili povus esti kune pli da tempo, Irina eĉ povus loĝi ĉe María. Koni esperantistojn estas koni familianojn, kiuj ĉiam pretas helpi onin! Danke al nia lingvo, esperantistoj estas rondo familia, kiel Zamenhof diris!



La solena fermo komenciĝis... tiam oni petis al ĉiuj brakumi siajn apudulojn... vera festo estis tie! La kongresanoj ridis, babilis, brakumis... eĉ ploretis! La emocio plenigis la teatron!... kaj post diri la informojn pri la venonta kongreso, la solenaĵo finiĝis...

Kiam la kongresanoj piediris por eliri, ili babilis, ridis, brakumis, petis interretan adreson, kaj tiel plu... Ili ne deziris forlasi la teatron! Parto de iliaj koroj restis tie!

María lasis la hotelon. Kiam ŝi eniris la flughavenon, ŝi aŭdis la voĉon de Abraham. Li demandis ŝin pri la kongreso, ŝiajn spertojn, ŝiajn sentojn, kaj tiel plu. María rakontis al li siajn spertojn, la multajn agrablajn eventojn, la nomojn de la novaj geamikoj el la plej diversaj landoj, la diversajn planojn, kiujn ŝi faris kun ili, la lokojn kie ŝi estis kaj tiel plu. Ŝi feliĉe rakontis la gravajn spiritajn riĉecojn, kiujn la kongreso alportis al sia animo... ŝi rakontis tion al li ĝis la enaviadiliĝo...

Ŝi fartis iomete laca... La kongreso havis multajn interesajn programerojn, konferencojn, ludojn... kaj la tempo ne sufiĉis al ŝi por fari ĉion, kion ŝi deziris fari, do ŝi preskaŭ ne dormis... sed ŝi sentis sin feliĉa, tre feliĉa kaj ŝi pensis, ke ŝia vivo, post sia unua Esperanto-Kongreso, jam tute



ŝanĝiĝis... nun ŝi sentis la realan eblecon de la unuigo de la mondo... kaj ŝi memoris kiam ĉiuj partoprenantoj, dum la solena fermo, kantis la Esperanto-Himnon... ili stariĝis kaj kantis parkere, laŭte, kune... ĉiuj sentis sin tiam kiel unu solan animon kantante al la amo kaj al la vivo! Jes, ŝajnis al mi, ke la himno estis kantata de unu sola potenca voĉo kaj ke la esperantistoj sentis siajn korojn unuigitaj kaj ĝoje batantaj samtempe!

Ŝi ekdormis... tiam ŝi aŭdis la voĉon de Abraham... sed nun ŝi ankaŭ povis vidi lin!

Abraham diris al ŝi:

— Mi atendis vian ekdormon. Dum la kongreso ankaŭ ni laboris ĉi tie, en la spirita mondo. Oni povus diri ke ankaŭ ni havis Esperanto-Kongreson!

María ridetis. Abraham estis ŝia spirita amiko, ŝia gvidanto. Ŝi respondis:

— Ĉu vere vi havis kongreson?

— Jes. Ĉiuj, kiuj laboras por la evoluo kaj disvastigado de la Internacia Lingvo, en la spirita mondo, venis ankaŭ al ĉi tiu urbo kaj laboris, taksis kaj planis la venontajn taskojn. Nun ni devas paroli pri tio, ĉar vi devas scii niajn novajn taskojn... Kiel vi diris en la flughaveno, la kongreso estis tute sukcesa!

Kaj ili ekpiediris kaj Abraham ekrakontis al ŝi...

Jes, la kongreso estis tute sukcesa!

Fonto: Almanko Lorenz 2016 (pp.169-172)



Ĉokolino

Facila



Iam estis knabineto, kiun ĉiuj nomis Ĉokolino, ĉar ŝia haŭto estis tiel bruna kiel ĉokolado. Ŝi estis bela kaj tre inteligenta, sed ŝi havis grandan problemon: ŝi ne ŝatis dividi siajn ludilojn. Se Klasiĵo petis ŝian

pupon, Ĉokolino respondis: "Nun mi ne povas". Se Sugango volis la ludilon, Ĉokolino respondis: "Nun mi ne povas".

Iun nokton Ĉokolino legis libron en sia lito. Kiam ŝi aŭdis, ke iu frapetis ĉe la fenestro de ŝia ĉambro, Ĉokolino rigardis tra la vitro de la fenestro kaj vidis maljunulinon, kiu vokis ŝin. Ĉokolino malfermis la fenestron. En tiu momento la maljunulino demandis ŝin: Ĉu vi deziras havi la plej belajn ludilojn por vi mem? La knabino rapide respondis: Jes!

La maljunulino donis al ŝi sian dekstran manon kaj komencis paŝi kun ŝi tra nekonata vojo. Fine de la vojo aperis granda kaj brila pordo. Ili eniris kaj Ĉokolino tre surpriziĝis, ĉar tie estis la plej belaj ludiloj el ĉiaj landoj, nur por ŝi.

Ĉokolino estis tre gaja kaj feliĉa kun tiuj ludiloj. Sed ŝi


ne perceptis ke la maljunulino malaperis. Ĉokolino ludis kaj ludis dum kelkaj horoj. Poste ŝi komencis enui, ŝi ne sciis kion fari. Baldaŭ ŝi komencis plori, ĉar ŝi estis tre sola en tiu nekonata loko. Ŝi sentis la mankon de Klarinjo kaj Suganjo. Ŝi ege deziris ludi kun ili kaj ŝi komencis krii kaj laŭte voki la maljunulinon. Sed la maljunulino ne respondis.

Tiam aperis granda horloĝo, sidanta sur ŝtonego, kaj mokis la knabinon. Rin, rin, rin, hahaha! "Ĉu vi ne deziris ludi sola per la ludiloj? Hahaha. Nun vi restos sola."

La sonondo de la horloĝo daŭrigis sian rin, rin, rin, sed en tiu momento Ĉokolino aŭdis voĉon kiu diris: "Mi estas tuj kun ili, sed unue mi devas trovi tiujn ludilojn en la skatolo, ĉar mi volas, ke miaj amiketoj estu feliĉaj ludante per ili. La patrino komprenis nenion, sed ŝi estis tre feliĉa ĉar Ĉokolino deziris dividi siajn ludilojn.

Verkis la infangrupo "Amiketo de kolibrado" el Kubo, gvidataj de Jose de J. Campos Pacheco kaj Maria Julia Cardenas Capiro. Nomoj de la infanoj: Juan Carlos Triana Alfonso, Laura Isabel Moreno Mista, Marcos Antonio Alzugaray Martinez kaj Karlo Lutermano.

Fonto: "EsperantoLehti" Esperanta Finnlando - februaro #1/2014



6

Kiam Rikardo konstatis, ke li estas sola en la loĝejo, lin kaptis sento de timo. Lia unua penso estis tute stulta — "Li foriris! Ĉu ankaŭ li ŝtelis mian monon?" — sed ĝi ne povis daŭri longe: kion oni ne havas, tion neniu povas preni.

Sonis la porda sonorileto. Rikardo hezitis. Ĉu li kapablos respondi al tio, kion la persono demandos?

Oni sonorigis duafoje. Ne tre memcerta, li tamen iris malfermi.

Staris antaŭ li junulino kun vizaĝo ridetanta.

"Oni diris al mi, ke ĉambro haveblas ĉi tie. Kontraŭ pago, kompreneble," ŝi muzik-voĉis.

Rikardo ruĝiĝis. Li ne komprenis, kial. Eble, ĉar ŝi estis bela.

"Nu, nu..." li komencis, sed li vere ne sciis, kion respondi.

Ŝi antaŭeniris tri paŝojn, tiel enirante, kun apenaŭ aŭdebla "Permesu".

"Belan loĝejon vi havas!" Ŝi rondrigardis. "Ĉambro ĉi tie perfekte taŭgus por mi."

Ŝi turnis la rigardon al Rikardo.

"Ĉu kostas multe?"

La junulo iom retrovis la kapablon paroli.

"Verdire, mi ne scias. Mi..."

"Ĉu vi loĝas ĉi tie senpage?" ŝi interrompis. "Tio estus eĉ pli bela!"

Ŝi ekridis, kaj la knabo opiniis, ke neniam li aŭdis ridon tiel belsonan. Lia koro batis rapidege. Li malfermis la buŝon, sed neniu sono elvenis. Ŝi rigardis lin plu. Li sentis sin ĝenata, kaj plena je nekonataj sentoj, samtempe timigaj kaj plaĉaj. Teruro kaj ĝojo lin okupis kune. Lia vizaĝo transiĝis de ruĝo al palo, de palo al ruĝo, kaj dum ĝi elmontris esprimon de pleja maltrankvilo, ĝi iel tamen sukcesis lumiĝi per ia rideto.

"Nu, nu, kio okazas al vi? Ĉu estas io ne en ordo?"

Ŝia voĉo ĉi-foje estis patrina. Rikardo sentis fortan deziron, ke ŝi kisu lin, ke ŝi tenu lin en siaj brakoj.

"Kompatindulo!" ŝi diris, kaj tiu vorto sonis feliĉige al liaj oreloj.

"Ŝi kompatas min, ŝi havas bonan koron!" li pensis, "eble eĉ si komencas ami min?"

Verdire, io simila al komenco de amo legiĝis en ŝiaj okuloj, kiam, enirante la kuirejon, ŝi eĉ pli patrinece proponis:

"Venu sidi ĉe la tablo. Mi preparos kafon. Kaj vi

rakontos al mi."

Ŝi rapide trovis mem, kie estas la kafo, la tasoj, la sukero. Eĉ kuketojn ŝi el ie prenis kaj metis sur la tablon. La junulo rigardis ŝin, mire kaj admire. Ĉiu ŝia movo disradiis plej altan kapablecon problemsolvi. Ŝi estis viva ekzemplo de agado praktika, trafa, laŭcela. Krome, la tutan tempon ŝi ridetis tiun mirindan, kortuŝan rideton, neforgeseble.

Kaj ŝia kafo! Kiel ŝi sukcesis fari ion tiel diecan? Ŝi ja uzis la samajn aferojn, kiel Milan. Jes ja, li trovis la kafon de Milan plaĉa, sed nur ĝis ĉi-momente, nur dum li ankoraŭ ne havis okazon provi tiun ĉi...

"Nu, finu vian kuketon, trinku iom pli da kafo, kaj rakontu al mi, ĉu konsentite?" ŝi diris, kvazaŭ al infano.

Kvarafoje Rikardo raportis la fi-agadon de Janĉjo. Li ankoraŭ ne alvenis al la momento, kiam li troviĝis ĉe la stacidoma monŝanĝejo, kiam la loĝeja pordo malfermiĝis.

"Nu, kio okazas ĉi tie? Kiu vi estas?" Milan elparolis, kaj aŭdiĝis, ke liaj nervoj ankoraŭ ne retrovis plenan trankvilecon.

La knabino respondis per sia muzika rido.

"Mi nomiĝas Katarina", ŝi klarigis. "Oni diris al mi, ke la sinjorino, kiu loĝas ĉi tie, luas ĉambrojn al studentoj dum la lernejjaro, kaj ankaŭ somere al vojaĝantoj, kaj mi venis informiĝi."

"Ne estas ĉambro libera nun..." komencis Milan, kaj tuj li sin demandis, ĉu li parolas saĝe. Ju pli li rigardis Katarinan, des pli ŝi aperis bela. Estus stulte lasi Rikardon ĉi tie kaj rifuzi loĝejon al tiu rimarkinda belulino, des pli, ĉar ŝi evidente havas personecon eman al ĝojo, dum kun filozofa Rikardo la ridoj ne tro oftis. Sed ŝi reparolis, antaŭ ol li havis la tempon bonorde aranĝi siajn pensojn:

"Pri la ĉambro ni reparolos poste, se vi permesos. Mi nun ŝatus aŭskulti ĝisfine la aventurojn de nia Rikardeto."

Rikardo kaj Milan estis ĉiurilate plej malsamaj. Sed en tiu momento iliaj sentoj eksimilis. Ambaŭ ekvidis en la alia iun danĝeran ulon, kapablan forŝteli al si amon, kiu, plej evidente, ne al tiu estis destinita.

Ĉe Rikardo, tiu sento kondukis al nenio praktika, sed en Milan iĝis klare, ke li devas seniĝi je sia kunloĝanto. Por tio necesas sendi lin...

"...Labori," ekdiris Katarina, nekonscia, ke ŝi ĝuste vortigas la ideon, al kiu Milan estis alvenanta.

"Labori vi devas. Tio estas la plej simpla solvo. Kion vi kapablas fari?"

Rikardo restis momenton kun buŝo malfermita, kvazaŭ nekomprene, antaŭ ol li sukcesis respondi:

"Nenion."

"Nu, tio simpligas la problemon. Vi do povas fari ion ajn!" ŝi diris ridante.

"Ĉu vi neniam perlaboris monon?" Milan demandis. "Eĉ dum la ferioj?"

"Ne. Miaj gepatroj estas sufiĉe riĉaj, kaj mi kapablas fari nenion."

Katarina intervenis:

"Nu, Milan, vi certe jam laboris, ĉu ne? Diru al mi, kiu estis la plej bone pagata okupo, kiun vi havis?"

"Mi estis gardisto."

"Gardisto? Kia?"

"Nu, ekzistas ĉi-lande firmao, nomata Sekuriks, kiu uzas gardistojn; ili rondiradas en la urbo por kontroli ĉiaspacajn aferojn ĉe diversaj laborlokoj, ĉefe magazenoj. La gardisto ricevas uniformon, kiu iom similas polican. Li devas kontroli, ĉu la pordoj estas ŝlositaj, kaj raportoj, se io aspektas nenormala. Li krome devas enskribi sian pason je tiu, tiu kaj aliaj lokoj per speciala en-mure lokita aparato, kiu mem

notas la daton kaj horon. Tiel eblas scii, ke la gardisto pasis je la ĝusta horo kaj vere estis tie, kie li devis. Tio uzigas ĉefe por kontrolo kontraŭ fajro."

Milan replenis sian tason per kafo.

"Laboro kiel Sekuriks-gardisto havas multajn bonajn flankojn," li daŭrigis. "Ĝi estas bone pagata, ĉar la uloj en tiu firmao neniam trovas tiom da homoj, kiom ili bezonas; mi ne scias, kial; eble ĉar multaj imagas, ke estas danĝere. Antaŭ kvar tagoj ili telefonis al mi por demandi, ĉu mi akceptus relabori por ili. Eble tio rilatas al la kunveno de la ŝtatestroj. Estu kiel ajn, mi respondis nee. Nun mi ferias, kaj miaj nervoj bezonas tempon senlaboran. Do, Rikardo, verŝajne vi ricevos la laboron, se vi iros prezenti vin, ĉefe se mi aldonos prezent-leteron dirantan, ke mi konas vin, kaj ke vi estas tute fidinda. Vi vidos, tiu laboro enhavas neniun problemon. Dank'al la uniformo la homoj lasas vin trankvila. Ili ĝenerale opinias, ke vi estas policano."

(daŭrigota)

Vortareto

admire	hayran olmuş şekilde	ju pli... des pli...	ne kadar... o kadar...	patrina	anaç
apenaŭ	hemen hiç, zorlukla	konstati	kanaat getirmek	perlabori	kazanmak
belsona	güzel sesli	laŭcela	hedefe odaklı	retrovi	tekrar bulmak
dieca	tanrısal	legiĝi	okunmak	rondiradi	sürekli dolaşmak
disradii	etrafa ışık saçmak	lumiĝi	aydınlamak	rondrigardi	çevreye bakmak
elmontri	göstermek	memcerta	kendinden emin	ruĝiĝi	kızarmak
enskribi	kaydetmek	mire	şaşırmış şekilde	simpligi	basitleştirmek
ĝenata	rahatatsız olmuş	muzik-voĉi	müzik sesi ile	sonorileto	zil
havebli	varlığını mümkün olmak	nekonscia	konuşmak	transiĝi	(içinden) geçmek
informiĝi	bilgilenmek	palo	bilinçsiz	verdire	muhtemelen
interrompi	lafı bölmek, araya girmek	paŝo	soluk adım	vortigi	kelimeleştirmek

La 76-a Hispana Kongreso de Esperanto

Hispana Esperanto-Federacio invitas vin partopreni en la 76-a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu okazos de la 23-a ĝis la 25-a de junio, en urbo Teruelo.

Dum 2017 la urbo festas la 800-jariĝon de la legendo de la Geamantoj de Teruel, plej fama historie kaj literature. Tial, la moto de la kongreso estas: "Teruelo, urbo de amantoj, amantoj de Esperanto".

Kiel kutime ĉe Hispanaj Kongresoj, la programo estos certe riĉa, el kultura, kleriga, distra kaj turisma vidpunkto. Ni povas jam anonci ke dum la kongreso ni ĝuos la reunuiĝon de la fama grupo Kajto, kiu koncertos kune, post pluraj jaroj, okaze de sia jubileo.

La kongreso memoros ankaŭ la figuron de D-ro Zamenhof, en la 100-a datreveno de lia morto. Kiel grava institucia programero, ni povas anonci jam ke dum la kongreso estos inaŭgurita la Glorieta (placeto)

de Esperanto en la urbo.

Oni ankaŭ planas aliajn agadojn en la tagoj antaŭ aŭ post la kongreso mem, por tiuj kiuj povos profiti la vojaĝon por resti pli da tempo en la urbo. Ni planas kurseton kaj turisman viziton por la 22a de junio, kaj kultura seminario la 26an kaj 27an de junio. Pri tio ni plu informos dum venontaj semajnoj.

Por pli da informoj kaj aliĝo iru al tiu retpaĝo:

<http://www.esperanto.es/hef/index.php/kongreso>



Vjetnamio prokrastis konstruadon de nukleaj reaktoroj

La 6an de novembro klariĝis, ke la komunista partio de Vjetnamio instrukiis al la registaro, ke tiu prokrastu konstruadon de la nukleaj reaktoroj, ĉar estas tre malfacile elspezi tiom da mono al la konstruado.

En 2010 Japanio sukcesis ricevi mendon de du nukleaj reaktoroj en Vjetnamio, sed pro tiu ĉi decido konstruado povos multe prokrastiĝi, do tio estos granda bato al la japana ĉefministro Abe, kiu intencas eksporti plej multajn japanajn reaktorojn al eksterlando por prospero de la japana ekonomio.

En Vjetnamio en tiu ĉi marto la registaro publikigis, ke la unua reaktoro ekfunkcios en 2028, sed pluraj el la nove elektitaj estraranoj timis malboniĝon de la financa situacio pro la konstruado kaj danĝeron de nuklea energio. Tamen la respondeculo de la ministerio pri ekonomio neis la eblecon ĉesigi konstruadon mem.

(Laŭ la ĵurnalo Mainiĉi, la 7an de novembro 2016)

Tajvano decidis forĵeti ĉiujn nukleajn centralojn ĝis 2025

En Tajvano, en 2015 elektro el la nukleaj centraloj okupis 14,1%, kaj nun funkcias 3 reaktoroj en tri centraloj. Post la akcidento de Fukuŝima kontraŭnuklea opinio plifortiĝis kaj en majo s-ino Cài Yīngwén, kiu promesis forĵeton de nuklea energio, elektiĝis kiel la prezidento de Tajvano. Ĉiuj reaktoroj en Tajvano fariĝos 40-jara ĝis 2025. En la reviziota leĝo pri elektro-industrio estos klare enskribite por fermi la vojon al refunkciigo, ke ĝis 2025 ĉiuj reaktoroj ĉesos funkcii.

La 23an de oktobro en la ĵurnalo Asahi aperis intervjuo kun s-ro Lee, la tajvana ministro pri ekonomio, kiun mi tradukos.

--- Kial Tajvano celas forĵeti nukleajn centralojn?

S-ro Lee: Post la akcidento en Fukuŝima multe ŝanĝiĝis publika opinio. La nova registaro montris forĵeton de ĉiuj reaktoroj kaj antaŭenigon de recikliga energio kiel sian klaran celon. Kiam la industria mondo kontaktas, ke tiu celo ne ŝanceliĝos, ĝi pozitive investos por recikliga energio kaj naskos grandan ŝanĝon.

--- Sajnas, ke tempo mankas.

S-ro Lee: Antaŭ ol ni klare montris nian celon, oni argumentis pri malfacileco kompensi perdotan 14,1% da elektro kaj dubis pri stabileco de tiu energio, kaj la konkludo estis, ke dependi de recikliga energio estos malfacile, kaj pri traktado de uzitaj nukleaĵoj, oni ĉesis

pensi serioze kaj evitis konkludon. Tia pensmaniero estas la plej granda malamiko de recikliga energio.

--- Kiel vi ŝanĝos?

S-ro Lee: Nun produkti elektron el sunenergia estas teknike sufiĉe mature, kaj sunenergiaj paneloj malmultekostiĝis. Por Tajvano naskiĝos granda bonŝanco. En la markolo de Tajvano blovas fortaj ventojn, do produkti elektron el ventoj estas plej eble. Tamen mankas sufiĉa teknologio al Tajvano, do ni atendas helpon de Japanio.

Recikliga elektro ne povos estis baza energio, sed se ni kombinos diversspecajn recikligajn energiojn, ni povos fari ĝin same kiel baza energio. Dume ni ekspluatos teknologion de energiakmulado kaj antaŭenigos elektroŝparadon.

--- Ĉu tio estas plenumbla?

S-ro Lee: Kiam ni celas forĵeton de nukleaj reaktoroj, ni ne demandu nin, ĉu ni povos anstataŭigi nuklean energion per recikliga energio, sed ni cerbumu pri tio, kia politiko estas necesa por ke ni ne lasu la problemon de uzitaj nukleaĵoj al nia posta generacio.

Tajvano saĝe elektis novan prezidenton kaj direktis sin al la ĝusta vojo, dume en Japanio oni elektis tiun aĉan ĉefministron kaj permesas, ke li refunkciigu pli kaj pli da nukleaj reaktoroj kaj eĉ permesas, ke li eksportu japanajn reaktorojn al eksterlando.

Japanio kaj Barato interkonsentis pri nuklea energio

La 11an de novembro la japana ĉefministro kaj la barata ĉefministro subskribis la konsenton pri nuklea energio. Per tiu interkonsento Japanio povos eksporti

nukleajn reaktorojn (inkludante nukleaĵojn, maŝinojn, instalaĵojn kaj teknologion) al Barato.

Barato eksperimentis atombombon en 1974 kaj en 1998 eksperimentis ĝin duan fojon. Ĝi ne subskribis Pakton pri ne-Proliferado de nukleaj armiloj (angle, Treaty on

Funkciantaj nukleaj centraloj en Barato. (La numeroj montras nombron de reaktoroj.)



the Non-Proliferation of Nuclear Weapons: NPT), tial multaj timas, ke tiu interkonsento plifaciligos ekspluatadon de nukleaj armiloj en Barato.

Japanio suferis/as pro la du atombomboj faligitaj sur sian teron, do ĝi havas devon proponi abolon de nukleaj armiloj en la mondo, sed la nuna registaro agas tute male. S-ro Sakuma Kunihiko, reprezentanto de la suferantoj de la atombomboj, forte protestas, dirante: "Barato ne subskribis la Pakton. Eksportotaj nukleaj povos esti uzitaj por produkti nukleajn armilojn. La ĉi-foja interkonsento kontraŭas la celon de NPT, kaj sekve Japanio povos engaĝiĝi en produktado de pli da nukleaj armiloj en Barato".

La 27an de novembro Japanio eĉ rifuzis subskribi la rezolucion pri okazigo de kunsido de Unuiĝintaj Nacioj por aboli nukleajn armilojn en la asembleo de UN. Nun Japanio fariĝis tute ne respektinda lando en la mondo.

Tertremo kaj nukleaj centraloj en Koreio

La 12an de septembro okazis tertremo kun 5,8 magnitudoj en Koreio. Tiu ĉi tertremo okazis najbare



de la du nukleaj centraloj Wolseong kun 6 reaktoroj kaj Kori kun 6 centraloj, kaj ene de radiuso de 30 kilometroj de tiuj centraloj loĝas 3,8 milionoj da homoj. La registaro insistas, ke la centraloj estas sufiĉe forte

konstruitaj kontraŭ tertremoj, sed protestantoj proponas forĵeton de malnovaj kaj malfortaj reaktoroj kontraŭ tertremoj kaj ĉesigon de konstruado de novaj reaktoroj n-roj 5 kaj 6 en la nuklea centralo Kori.

(Laŭ la ĵurnalo Akahata la 20an de septembro 2016)

Aparta modelo de fotovoltaaj centraloj en Ĉinio: elektrejo plus fiŝejo



Birdrigardo al la aparta fotovoltaaj centraloj en Cixi de Zhejiang, Ĉinio.

La elektro estas vendata al la ŝtata elektro-reto de Ĉinio, kun la jara enspezo je 240 milionoj da juanoj al la posedanto, dum la profito el fiŝbredado eblas je 13 milionoj da juanoj. La nova suncentralo provizos per elektro la urbon Ningbo, urbegon proksiman al Cixi, kaj eĉ al la tuta provinco Zhejiang. La averaĝa produktokvanto de elektro je 220 milionoj da kilovathoroj sufiĉos por konsumo de 100 mil familioj. Tio signifas ŝparon de 70.4 mil tunoj da karbo.

Redaktoro: Xie Ruifen

Fonto: El Popola Ĉinio:

http://www.espero.com.cn/2017-01/12/content_40091032.htm

La 11-an de januaro, oficiale ekfunkciis la lande plej granda fotovoltaaj elektrejo kun ĝia fiŝejo sube en la akvareo de la akvejoj Zhouxiang kaj Changhe de la urbo Cixi de la provinco Zhejiang en sudorienta Ĉinio. La totala investado al la programo estas 1,8 miliardoj da juanoj. La elektrejo kovras akvareon de ĉirkaŭ 4 492 muoj kaj laŭplane ĝia jara produktokvanto de elektro estos ĉirkaŭ 22 milionoj da kilovathoroj.

Laŭ diskonigitaj informoj, tiu elektrejo kun fiŝejo rezultas de unuiĝo de fotovoltaaj centraloj kaj fiŝbredada industrio. Oni aranĝas sunpanelojn super la fiŝejo kaj en la akvo eblas bredi fiŝojn kaj salikokojn. La tabuloj povas bone ŝirmi la fiŝojn. Tiel formiĝas la modelo: elektrejo supre kaj fiŝejo sube.



Birdrigardo al la aparta fotovoltaaj centraloj en Cixi de Zhejiang, Ĉinio.

Vasilij Eroŝenko - La akrvida blindula poeto

Vasilij Eroŝenko (1890-1952), la rusa blindula poeto alvenis en Ĉinion en oktobro de 1921, elpelite de la japana registaro, en Shanghai juna esp-isto Hujucz akceptis lin, poste li veturis al Pekino, kaj loĝis en la hejmo de s-ro Lusin, la granda ĉina verkisto. S-ro Lusin ĉinigis liajn fabelojn verkitajn en la japana lingvo. Tiam li donacis al la ĉinaj junuloj la " Ruĝa floro"-n, ankaŭ ekde tiam en iliajn korojn ĉizis "Cikatro de amo"-n.



Kvankam V. Eroŝenko estas nomita "la blandula poeto", tamen liaj ĉefverkoj estas fabeloj. Legante liajn fabelojn, "lia sonĝo naiva, bela, sed kun vereco" tiras mian koron, mi ankaŭ sentas "la triston de la aŭtoro, kiu vokas en la mondo ĉiujn ami, sed ne gajnas la amon" (laŭ s-ro Lusin).

"Oni nomas lin revisto, aliaj diras ke li estas anarĥiisto, aliaj timas ke li estas 'danĝerulo'; ili ĉiuj lin malkomprenas. Li estas homaranisto, nur homaranisto." (1) Kvankam li estas blindulo, tamen li pli klare konis nian mondon ol aliaj. Ŝajnas al mi, ke li konus nian mondon per sia animo ĉiujn ami, tial li havus pli akran vidon ol aliaj.


Eĉ hodiaŭ mi relegante lian fabelon La trimova ŝakproblemo – la tria skizo el la ĉukĉa vivo –, pri la homa tragedio de ĉukĉoj en la Tundro, mi ankoraŭ sentas min timtrema. V. Eroŝenko skribis en la Antaŭparolo: "la skizo estis skribita jam en junio de 1934, sed mi perdis la manuskripton dum mia vajaĝo al Turkmenio en la sama jaro. Nur dum ĉijara libertempo (1938) mi ekprovis reskribi ĝin, kaj jen la rezulto."(2) laŭ la notoj faritaj de la kompilinto de La tundro ĝemas, s-ro Mine Yositaka, nia estimata eroŝenkologo, la skizo aperis nur en "aldono al Esperanta Ligilo" en decembro, 1947.

La aŭtoro en Julio de 1929 alvenis en la ĉukĉan kulturbazon por viziti sian fraton, la bazan veterinaron, tie li pasigis kelkajn monatojn kun aventurplena vivo.

La aŭtoro skribis: "Ju pli grandiĝas niaj mondaj urbegoj, la centroj de la civilizacio, des pli malgrandiĝas la homo, des pli banaliĝas kaj trivialiĝas, bagateliĝas kaj mizeriĝas...Kaj gravas tiam ne homo mem sed lia kapitalo, ne lia kapo sed lia poŝo, ne lia koro sed lia oro." Tamen la ĉukĉoj vivas en la Tundro de la arkta regiono de la Nord-orienta Azio tute estas alie. "Tie oni lernas ŝati la homon mem, ĝuste taksii lian vivon, respekti lian liberecon."(3)

En la skizo (fabelo) troviĝas la atentokapta intrigo, kiu igis nin serioze mediti. Iu eŭrope edukita kuracisto de la bazo, komunisto, "celis politikan karieron", instruis al ĉukĉoj, kio estas la klasbatalo kaj komunismo, tamen iu parolis "ne instrui sed lerni de la ĉukĉoj la komunismon devas vi." dum li prelegas.

Iutage la propaganda fako de la bazo invitis la indiĝenajn gastojn spekti filmon por altigi ilian klasbatalan konscion. Vidante la sangajn batalajn scenojn de la unuamondmilito kaj la rusa enlanda batalado, ĉukĉa naiva kaj bonkora junulo, amiko de la aŭtoro (mi-o en la skizo) dolore tremis, eĉ feblis. La kuracisto batis la junulon per la violona arĉo, insultante, la aŭtoro kolere forĵetis la arĉon protektante sian amikon...



La ideologia konflikto fariĝis sanga agado, la kuracisto denunciis al GPU (Ŝtata Politika Administracio). Tiu vorto "eŭrope edukita" signifas edukitan en la eŭropa parto de Soveta Unio, mi komprenas. Eĉ "la estro de la GPU invitis min amike ludi ŝakojn kun li post la matenmanĝo". La aŭtoro estis jam atentita de GPU pro lia kompato al ĉukĉoj kaj aprobado al iliaj opinioj.

La aŭtoro meditis antaŭ ŝaktabulo por solvi la trimovan ŝakproblemon, li komprenis, ke tiu ankaŭ estas la viva problemo: naskiĝo, vivo kaj morto. Laŭ la "nigra nomlisto" de la tundraj amikoj, kiun subŝovis la eŭrope edukita friponego, "en GPU-ejo nepriskribebla tumulto; denove oni planas amasajn arestojn."(4) Je la fino de

la skizo, la aŭtoro skribis: "tra la dolĉega duonsonĝo, mi aŭdis ankoraŭ la kuiristinon senbrue engliti mian ĉambron. Ŝin sekvis ankaŭ senbrue la bazestro kaj la GPU-estro. Mia ĉiam bonkora protektantino nun flustris: 'Mi ĉiam suspektis, sed nun mi estas certa.' Pri kio ŝi estis certa, mi jam ne aŭdis, ĉar mi endormiĝis...Mi malestiĝis...Mi mortis."(5)

Antaŭ legantoj ja estas la interhoma tragedio! La aŭtoro skribis, ke la skizo estis verkita en 1934, sed la manuskripto perdiĝis dum vojaĝo al Turkmenio, reverkis en 1938, tio eble estus preteksto, tamen 1934 ja estis antaŭnokto de la Granda Purigo, lanĉita de J. Stalin, kiu okazis en 1937-1938, en tiu katastrofo preskaŭ ĉiuj aktivaj sovetuniaj esperantistoj estis purigitaj – mortigitaj aŭ ekzilitaj en la koncentrejojn. Nia blindula poeto tiam restis en Turkmenio, lia verko estis en la blindula skribo de Esp-o, feliĉe li travivis dum la Granda Purigo. Ĉi tiu skizo de V. Eroŝenko ĝuste estas la unika aŭtenta raportaĵa verko en tiu periodo, la aŭtenta noto de "lia sonĝo naiva, bela, sed kun vereco". Li ja estas elstara profeto, per sia animo antaŭsentis pri alveno de tiu homa katastrofo, la publikigo de tiu verko ja estas la miraklo inter mirakloj! Li eĉ pli klare vidus la mondon ol ni, malblindaj.

V. Eroŝenko jam forlasis nian mondon, tamen liaj fabeloj ankoraŭ kortuŝas nin, per la 12a volumo de Plena Verkaro de Lusin rezervanta liajn iujn verkojn, tradukitajn de Lusin, la ĉinaj legantoj ankoraŭ povas aŭdi lian vokon de "la tristo de la aŭtoro, kiu vokas en la mondo ĉiujn ami, sed ne gajnas la amon", pli feliĉe samideanoj povas legi en Esp-o liajn ĉefverkojn. Dum alveno de lia naskiĝtaga 125a jubileo, la plej bona memoro por nia blindula poeto ja estas refoje legi liajn verkojn, kaj klopodadi por la homara harmonio – Homon ami mem.

Shi Chengtai

-
- (1) *Lumo kaj ombro*, kompilita de Mine Yositaka, *Japana Esp-a Librokooperativo*, 1979, p. 3
- (2) *La tundra ĝemas*, kompilita de Mine Yositaka, *Japana Esp-a Librokooperativo*, p.32
- (3) *same (2)*, p.23
- (4) *same (2)*, p.63
- (5) *same (2)*, p.63

Fonto: El Popola Ĉinio

<http://esperanto.cri.cn/2841/2017/03/28/173s192287.htm>

Turmentas Hejmsopiro

Turmentas Hejmsopiro (kun kanto)
--- *Laŭ melodio Sumuzhe*
Fan Zhongyan (989-1052)
Esperantigita de Hu Guozhu

Rimarko
Sin trovas 12 kantoj kantitaj de
Teresa Teng, monde fama
kantistino. Ĉiu teksto el ili devenas
de antikvaj ĉinaj poemoj, kiujn
sinjoro Hu Guozhu esperantigis por
Kampo de Literatruo. Ni aperigas
ilin unu post alia, kaj por via ĝuado
de kanto origine kantita de Teresa
Teng ni aŭdigas tiun ĉi pecon
Turmentas Hejmsopiro.

Fonto: El Popola Ĉinio

<http://esperanto.cri.cn/2841/2017/04/05/177s192398.htm>

>> *La kanto aŭskulteblas en la*
retpaĝo

Bluaj nuboj en la ĉielo.
Flavaj folioj sur la tero.
En ondojn fandiĝis aŭtuno.
Akve smeraldas frosta fumo.
La subiranta suno monton kisas.
Ĉielo kaj akvo interligiĝas.

Despli turmentas hejmsopiro
ekstere de la sunsubiro.
Malsarena pensdevio
kroĉiĝas al nostalgio.
Ĉiunokte nur sonĝo bona
retenas min al lit' dormdona.
Sub brila lun' en alta turo,
ne restu soleca figuro.
Ĉar vino en trista intesto
larmiĝis amsopira manifesto!





Saluton,

En ĉi tiu numero de nia revueto ni daŭrigas la Mallongan Historion de Filozofio kun George Berkeley

Vasil Kadifeli

La elefanto en la domo; George Berkeley kaj John Locke



Kiam vi malfermas la pordon de la fridujo ĉu ankoraŭ la lampo lumas en ĝi? Kiam vi forlasas la domon ĉu via dormoĉambro ankoraŭ restas en ĝi? Jes vi povas meti kameraon en la fridujo aŭ alian homon en via domo por sciigi al vi la veron. Sed kiam ne

estas kamerao en la fridujo aŭ alia homo en la domo ĉu vi povas esti certa pri la afero? Preskaŭ ĉiu supozas, ke la lampo estingiĝas en la fridujo kaj la dormoĉambro restas en la dormo, do ni supozas, ke la mondo fakte estas ie. La mondo ne estas nur en nia menso.

Sed la irlanda episkopo kaj filozofo **George Berkeley (1685-1753)** diris, ke objektoj, kiujn oni ne observas ankaŭ ĉesas estiĝi. Laŭ Berkeley objektoj, kiujn ni ne observas, estiĝas ie pro niaj antaŭaj spertoj. Ĉio estas la kolekto de spertoj de vi, de aliaj kaj eble de Dio. Berkeley kredas, ke ne povas ekzisti ekstera mondo. Sed ĉion li diris ne ŝajnas racia al ni. Kiam li unue esprimis sian teorion homoj pensis ke li frenezigiĝis. Nur post lia morto filozofoj komprenis kion li fakte diris. Kiam **Samuel Johnson**, kiu vivis en la sama tempo, aŭdis tiun teorion, li piedbatis ŝtonon kaj diris “mi kiel tiu ŝtono refutas lian teorion”. Lia piedo doloris pro la ŝtono kaj tiel li estis certa, ke la ŝtono ekzistis. Sed Berkeley estis pli inteligenta ol li. Li diris ke la doloro ne pruvas la ekzistadon de la ŝtono, sed nur la penson de ŝtono. Li diris ke la doloro estas pro nia penso, kaj malantaŭ ĝi ne ekzistas vera ŝtono kiu kaŭzas la doloron.

Oni taksas Berkeley-on kelfoje kiel idealisto kaj kelkfoje kiel nematerialisto. Idealisto ĉar li kredis, ke ĉio ekzistas en pensoj, nematerialisto ĉar li refuzis la fizikajn objektojn. Lin mirigis la rilato inter la “aspekto” kaj la “realeco” de objektoj. Li kredis ke filozofoj tute

ne komprenis tiu rilaton, kaj ĉefe **John Locke** (vidu la antaŭan numeron) tute ne komprenis tion ĉar li havis malsimilajn pensojn pri la mondo. Por kompreni Berkeley-on ni devas kompreni la pensojn de Locke kaj kompari ilin.

Locke diris: kiam vi vidas elefanton, vi fakte vidas tion, kion vi akceptas kiel reprezentaĵo de elefanto. Ĝia grandeco, formo ktp estas la unuarangaj ecoj, kaj tiuj estas la veraj trajtoj de iu objekto. La koloro, odoro ktp de elefanto estas ĝiaj duarangaj ecoj. Nur pensoj pri la unuarangaj ecoj similas al la realaĵo. Locke kredis je reala mondo kaj pro tio li estis realisto. La reala mondo daŭras ekzisti eĉ se neniu konscias ĝin. Lia teorio diras, ke la unuarangaj ecoj difinas la realajn objektojn, sed de kie li sciis tion? Lia teorio ne difinas ĝin.

Berkeley pensis ke li estis pli kohera ol Locke, ĉar li pensis, ke homoj perceptas la mondon rekte, kaj la mondon formas nur pensoj. La nura afero kiun homoj travivas estas spertado, la mondo ekzistas en la menso. “**Esse est percipi**” aŭ “estiĝi estas percepti” li diris. Se la menso ne spertas ion, tiam tio ne ekzistas.

Fakte Berkeley neniam diris ke objekto jen aperas kaj jen malaperas. Li pensis, ke la daŭradon de niaj pensoj disponigas Dio. Dio perceptas ĉion en la mondo kaj do la mondo estiĝas. La dormoĉambro perceptas Dio, do ĝi estas en la domo kiam ni estas for. Tamen Berkeley havis malfacilecon kompreni la erarajn perceptojn. Ekzemple kiam vi metas kuleron en glaso kun akvo la kulero ŝajnas rompita. Lock dirus, ke en realo la kulero estas bona, sed ĝi vidiĝas kiel rompita. Laŭ Berkeley ni havas la penson de rompita kulero sed se ni etendos la manon al ĝi ni komprenos, ke ĝi ne estas rompita, do estas ia kontraŭdiro en lia teorio, kiun li ne povis solvi.

Berkeley ne ĉiam pasis sian tempon defendante sian teorion. Li faris multajn aliaj aferojn sed li ne multe sukcesis en ili. Tamen li estis homo preta sekvi la argumenton ĝisfunde, kie ajn ĝi irus. Lian nomon oni donis al universitato en Kalifornio (Usono) pro unu verso en unu el liaj poemoj: “**La imperio liniis sian itineron okcidenten**”.

(daŭrigota)

EL UNUA PARTO - TAŬO



17

Se la granda TAŬO pereas,
ekestas moralo kaj devo.
Se leviĝas prudento kaj sciado,
ekzistas la plej grandaj mensogoj.
Se la parencoj malunuiĝas,
ekzistas la infandevito kaj la amo.
Se la ŝtatoj konfuziĝas,
ekzistas la fidelaj oficistoj.

Rimarkoj de Cezar

Tie, kie oni krias plej laŭte pri iu abstrakta libero, estas ne tute hazarde malplej da libero. Usono, (ne Ĉinio!) havas momente la plej multajn prizonojn, sed la plej grandan diinan skulpturon de l' libero. Kie oni plej multe parolas pri moralo, virto kaj justo, tie tiuj kompreneble plej mankas. Ankaŭ Marks iam laŭsence atentigis pri tio, ke li tute ne celas justan socion, sed socion, en kiu neniu plu parolos pri justeco, ĉar ne plu estos juĝistoj kaj advokatoj kaj juĝejoj ktp... Eblas, ke li ĉe tio pensis pri la supra ĉapitro de Laocio.

Min plej fascinas, ke moralo por Laocio en la plej bona kazo estas lambastono, sed ne plu. Ne per tio, ke ni obeas al iu moralo, ni liberigas nin, sed per tio, ke ni superfluigas ĝin, ĉar ni forigas la kaŭzojn, kiuj necesigas moralon. Kia granda penso de Laocio, ĉu ne?

Mi aldonas ankoraŭ tion: Ne per tio, ke ni ĵetas homojn en prizonojn, ni plibonigas ilin, sed per tio, ke ni superfluigas prizonojn.

19

Demetu la sanktecon, forĵetu la sciadon,
tiel la popolo gajnos centope.
Demetu la moralecon, forĵetu la devon,
tiukaze la popolo reiros al infaneca devo kaj amo.
Demetu la lertecon, forĵetu la gajnon,
tiukaze ŝtelistoj kaj rabistoj ne plu ekzistos.
Pri tiuj tri aferoj
la bela ŝajno ne sufiĉas.
Tial zorgu por tio, ke la homoj povu teni sin je io.
Montru simplecon, firmtenu la honestecon!
Malpliigu kaj la egoismon kaj la avidon!
Ĉesigu la erudicion!
Tiel vi liberigos vin de zorgoj.

Rimarkoj de Cezar

Edukito en landoj, kie la scio estas privilegio de malmultaj, estas vole-nevole privilegiito. Ke tiujn privilegiojn ebligas ĝuste tiuj, kiuj neniam vidis universitaton de interne, estas maljusta afero. Tia scio akirita koste de aliaj, estas

dubinda.

20

Ĉu inter „certe“ kaj „tute certe“:
efektive estas diferenco?
Ĉu inter „bono“ kaj „malbono“
efektive estas diferenco?
Kion la homoj honoras, tion oni devas honori.
Ve, soleco, kiom longtempe vi daŭros?
Ĉiuj homoj estas tiel brilaj,
kvazaŭ oni irus al granda festoferado.
Kvazaŭ ili grimpus printempe sur la turojn.
Nur mi estas hezitema, al mi ankoraŭ ne aperis signo,
kvazaŭ kiel suĉinfano, kiu ankoraŭ ne povas ridi,
maltrankvile, ĉirkaŭpelate, kvazaŭ mi ne havus
hejmlandon.
Ĉiuj homoj havas abundon;
nur mi estas kvazaŭ forgesita.
Mi havas la koron de ŝtipkapulo, tre konfuzan kaj
malhelan.
La laŭmondaj homoj estas helaj, aĥ, tre helaj;
Nur mi estas kvazaŭ malklara.
La laŭmondaj homoj estas prudentaj, aĥ, tre prudentaj;
Nur mi estas kvazaŭ fermita en min mem,
maltrankvila, aĥ, kiel la maro,
kiriĝanta, aĥ, sen interrompo.
Ĉiuj homoj havas siajn celojn;
nur mi estas vagemaj kiel almozetanto.
Nur mi estas alia ol la homoj:
Sed mi rigardas tion valora
serĉi nutraĵon ĉe la patrino.

Rimarkoj de Cezar

Rikardo Vilhelmo atentigis nin pri tio, ke la signo estas la orakolo, kiu antaŭ ĉiu grava entrepreno estis pridemandata (en la malnova ĉina tempo per karapacoj, kiuj estis ekbruligitaj kaj per kies ŝiraĵoj oni legis la respondon).

El la kriza sento de alieco de individuo inter la aliaj homoj ekestis en la monda literaturo multaj famaj verkoj. Ekzemple Faŭsto de Goeto. Pli poste por ekzemplo la ekzistencialismaj libroj kaj teatraĵoj de Sartre aŭ la romanoj kaj rakontoj de Ernest Hemingway, ĉiuj ĉi verkistoj laŭ mia opinio tre bone priskribis tiun solecosenton de individuo en la homaro, kiu nun jam preskaŭ tute estas disfalinta en homatomojn.

En la originala teksto Laocio uzis tiun ĉi vorton: „wei“ (fonetike) laŭ Anniespera signifas „timi“ Legu pri tio ankaŭ ĉe s-ro Wang Chongfang mem: „Tio, kion aliaj timas, ne povas ne esti timata.“ La patrino en la lasta frazo de la ĉapitro estas ĉe Wang Chongfang la TAŬO.

(daŭrigota)

Ŝercoj



Fama verkisto Stevan Sremac (1855-1906) foje estis kun geamikoj kiuj parolis pri imposto. Li atente aŭskultis la konversacion. Tiam li diris:

- Miaopinie, el ĉiuj impostoj, la plej utila estus tiu sur virina beleco!

- Kial vi tiel pensas?

- Ĉar ĉiu virino ekscite kaj admire pagos ĝin!

Kuŝante sur sia mortolito franca reĝo Louis la dektria ordonis, ke oni venigu lian filon, la kronprincon, por ke li vidu lin por la lasta fojo. Li sukcesis iel leviĝi kaj el proksime vidi lin. Tiam li demandis la filon:

- Kiel vi nomiĝas?

- Louis dekkvara - respondis la knabo.

Eniras viro en vendejo de vestaĵoj kaj demandas al la juna, bela kaj blonda vendistino:

- Ĉu vi havas kalsoneton?

- Ne, respondas ŝi.

La viro iomete pripensas la aferon kaj poste redemandas:

- Bone, sed ĉu vi havas kalsoneton por vendi?

Junulo kisas junulinon kaj alportas ŝin al la sofo.

Ŝi petas de li:

- Eble poste, post la geedziĝo...

- Ne, diras la junulo, post la geedziĝo via edzo kaptos nin kaj estos granda skandalo!



Kruĉvort-enigma



Horizontale:

1. Kapablo juĝi la realaĵojn kaj agi kapable juĝante la cirkonstancojn kaj laŭ tio ĝuste kondukti; Fabela estaĵo de malsupera rango, dotita

per supernaturaj povoj.

2. Pastopoŝet' aŭ bul', entenanta muelitan viandon, fiŝaĵon aŭ ĉasaĵon, kaj fritita en graso aŭ oleo; (inverse) Boat' aŭ ŝip', por transveturigi homojn, aŭtojn, vagonojn aŭ aliajn veturilojn.

3. La labora organizaĵo (homoj kaj ejoj) de gazeto, revuo ks.

4. Estanta proksime; Ido de Eŭropaj gepatroj, naskita en intertropikaj kolonioj.

5. Prepozicio uzata por rilatigi du vortojn aŭ sintagmojn, el kiuj la unua esprimas mezuron (kvanton, pezon, longon, volumenon k.a.) de la dua; Malpeza kaj hela biero, fabrikata per malmulte rostita malto; Cirkonstanca morfemo, esprimanta la ĝeneralan ideon pri ŝanĝiĝo de stato, kaj pli precize signifanta de nun, sen plua atendo, senplie ktp.

6. Elemento, Au, atomnumero 79; Cirkonstanca morfemo signifanta «en la tago tuj venonta post la hodiaŭa»; Prepozicio montranta la posedanton.

7. Pronomo uzata por demandi pri afero, konkreta aŭ abstrakta; Sufikso esprimanta kolekton de samspecaj ekzistaĵoj aŭ objektoj, formantaj unu tuton; Vaz', tre diversa laŭ la materialo, formo kaj uzoj, ordinare destinita

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1												
2												
3												
4												
5												
6												
7												
8												
9												
10												

por kuirado.

8. La tuto de la koncernataj aferoj, aŭ ĉia ajn elemento de tutaĵo; Strio, farita per eltiro de pluraj vefteroj aŭ varperoj, en kiu la restintaj fadenoj estas diversmaniere orname faskigitaj.

9. Azia bordo de la Egea Maro, iam loĝata de unu el la helenaj triboj; Malĝusta opinio, konduto aŭ faro.

10. Kuraca arto malhelpi aŭ korekti deformiĝon de korpo, precipe ĉe la infanoj.

Vertikale:

1. Solena ceremonia marŝo en difinita ordo; Adjektivo signifanta «de ĉiu (ajn) speco».

2. Teritorio, estrata de episkopo en ortodoksa eklezio.

3. Nom' de la formo de la hindustana lingvo, parolata de la islamanoj kaj skribata per araba alfabeto; Elektre ŝargita formo de molekulo aŭ de atomo, kiu akiris aŭ perdis elektronojn.

4. Larĝa rubando, tenanta la harojn de virino, ofte ornamita per juveloj; Elemento, kun atommaso 192,22 kaj atomnumero 77.

5. Ŝtupetaro; Malgranda nokta simi' de Ameriko grandokula.

6. Malutil'; Objekt' el oro, precipe juvelo ks.

7. (inverse) Skota mallonga jup' por viroj; Migranta bird' el la ordo de grufarmaj, kun longaj, maldikaj kruoj kaj kolo, kun longa, pinta beko kaj kun mallonga posta piedfingro.

8. Formanta angulo de 90°; Morfemo kiu signifas «denove».

9. Regula interaranĝ', kaj pli precize maniero, en kiu la objektoj sekvas unu la alian.

10. Konkreta aspekto de agoj (pl); (inverse) Nedifina adjektivo signifanta «de tute ne difinita speco, kun tute nedifinitaj ecoj».

11. Sufikso signifanta unu el la konsistigaj elementoj de tutaĵo; Relative maldika plato el metalo, precipe el fero; Nomo de la 21-a grafemo de la esperanta alfabeto.

12. Vidakreca tabulo aŭ ĉia testo, uzata por mezuri la vid-akrecon.

(La solvo troviĝas en la lasta paĝo)

el "Lingvaj Respondoj" de L.L.Zamenhof (4)

Gramatiko

Pri «sidiĝi» kaj «eksidi»

Vi estas prava: anstataŭ «sidiĝu» estus pli bone diri «sidigu vin» aŭ «eksidu»; tamen ĉar la formo «sidiĝu» jam de tre longe estas uzata preskaŭ de ĉiuj Esperantistoj, tial ĝi fariĝis jam «esperantismo» kaj nomi ĝin eraro oni jam ne povas. Ne sole en naturaj lingvoj, sed ankaŭ en lingvo artefarita ĉio, kio estas uzata de la plimulto de bonaj verkistoj, devas esti rigardata kiel bona, se ĝi eĉ ne estas absolute logika; ĉar se ni postulos ĉiam nur logikon absolutan, tiam la libera uzado de lingvo artefarita fariĝos tute ne ebla, ĉar tiam malaperos ĉiu utileco de longa ekzerciĝado kaj en la deka jaro de uzado de la lingvo, kiel en la unua jaro, ĉiu devus konstante tro longe pripensadi kaj pesadi ĉiun sian vorton. Tamen la diferenco inter lingvo natura kaj lingvo artefarita konsistas en tio, ke, dum en la unua oni devas uzi nur tiujn formojn, kiujn uzas bonaj verkistoj, kaj uzado de formo pli logika estas malpermesata, — en lingvo artefarita ĉiu havas la rajton uzi formon pli logikan, kvankam neniu ĝis nun ĝin uzis, kaj li povas esti konvinkita, ke se lia formo estas efektive bona, ĝi baldaŭ trovos multajn imitantojn kaj iom post iom elpuŝos la malpli logikan, kvankam ĝis nun pli uzatan formon malnovan.

Respondo 3, La Revuo, 1906, Decembro

Pri la prefikso «ge»

La prefikso «ge» rilatas ne sole al du personoj, sed ĝi povas rilati ankaŭ al multaj personoj; ĝi signifas simple «de ambaŭ seksoj». Mi persone ĝis nun uzadis tiun ĉi prefikson ĉiam nur por esprimi ian ambaŭseksan familian tutaĵon el personoj starantaj en la sama linio de parenceco; tial mi diradis ekzemple «gepatroj», «gemastroj», «gefratoj», «genepoj», «gekuzoj», «getajloroj» (en la senco de «tajloro kaj lia edzino»); sed ni neniam esprimis ekzemple per «getajloroj» la tutan familion de tajloro, ĉar la gefiloj de tajloro ne staras en la sama linio de parenceco kun la tajloro, kaj mi ankaŭ evitadis diri «gesinjoroj» pri personoj, kiuj ne apartenas al unu familio (mi nomadis ilin «sinjoroj kaj sinjorinoj»). Tamen mi konfesas, ke mi havis nenian kaŭzon, por uzadi la prefikson «ge» sole en la dirita maniero. Ĉar en la fundamenta (universala) vortaro de nia lingvo «ge» signifas simple «de ambaŭ seksoj», kaj ĉar la uzado de la prefikso en tiu ĉi senco neniam donas malkompreniĝon, tial ni povas tre bone uzi tiun ĉi prefikson en ĉiuj okazoj, kiam ni parolas pri ambaŭ seksoj. Sekve se al personaro, kiu konsistas el ambaŭ seksoj, iu sin turnas kun la vorto «gesinjoroj», li faras nenian eraron, kaj eble mi mem ankaŭ de nun iafoje uzados la prefikson en tiu ĉi senco.

Respondo 6, La Revuo, 1901, Februaro

Kuirarto

MITUL PIPRAĴO

Hodiaŭ ni kuiras pladon el Napolo, unu el la plej facila por prepari kaj plej bongusta de la itala kuirarto.



INGREDIENCOJ (4 personoj)

- 2 kg da mituloj
- Pano por fari krustegojn
- ajlo
- olivoleo
- petroselo
- pipro
- salo
- origano

Ni komencas purigi la mitulojn. Ni forigas la mitulojn kun rompita aŭ malferma konko, ni gargaras ilin

subakve, ni purigas la mitulojn unuope, kaj ni skrapas la konkon kun la klingo de tranĉilo por forigi la krustojn, ni deigas la barbeton, kaj fine forigas la malpuraĵojn. Ni metas la mitulojn en bovlo de malvarma akvo aŭ kovras ilin per malseka tuko, kaj metas en la fridujo.

Ni preparas krustegojn. Ni tranĉas la tranĉaĵojn de pano kaj spicigas kun oleo, ajlo kaj origano. Ni metas ilin sur graskoletilo kovrata kun la fornopapero kaj ni lasas toasti ĝin dum kelkaj minutoj ĝis ili estas helbrunaj.

Nun ni kuiras la mitulojn. Ni metas iom da oleo en granda poto, ni aldonas la ajlon, tiam ni verŝas la drenitajn mitulojn, kaj ni kovras per kovrilo kaj kuiras ĝis kiam ili ne estos malkaŝitaj.

Ni rotacias la paton por miksi. Kiam la mituloj estos malfermaj, ni spicigas kun haketita petroselo, pipro kaj ni agitas la kaserolon por gustigi ilin. Ni servas kun la krustegoj.



Bonan apetiton!

Fonto: <https://kuirukunmi.com/2016/05/30/mitula-pipraĵo/>

Vortareto

		klingo	keskin taraf	mitulo	midye
ajlo	sarimsak	konko	kabuk	rotacii	ĉevirmek
barbeton	sakalcik	krustego	kızarmış ekmek	skrapi	kazımak
drenita	suyu süzölmüş	krusto	kabuk	toasti	kızartmak

48-a Itala Esperanto Kongreso

26. aŭgusto - 2. septembro en Heraclea (Matera), Italio. Kiel oni atingas la plej sudan parton de Eŭropo? Problemoj nenias. La granda itala urbo Bari estas laŭ la loka diraĵo pli grava ol Parizo; tio eble estas ioma troigo, sed ĉiuokaze ĝi havas flughavenon: Bari-Palese aŭ Bari-Karol Wojtyła, el kiu aŭtobusoj atingas Heraclea-n aŭ la proksiman Policoro-n. Pluraj malaltkostaj fluglinioj, kiel Ryanair, flugas al ĝi el la plej malproksimaj eŭropaj urboj, Vilno aŭ Budapeŝto aŭ Londono aŭ Berlino. Homoj, kiuj mendas nun, kaj kelkaj

jam faris, pagas tre malmulte. LKK intencas aranĝi ankaŭ propran aŭtobuson en kelkaj ŝlosilaj tempoj de sabato por porti vin de la flughaveno al la kongresejo en Heraclea

<http://kongreso.esperanto.it/84/bonvenon.htm>



Sur unu el la Danaj insuloj, kie malnovaj juĝejoj vidiĝas sur la grenkampoj kaj inter potencaj arboj de la fagarbaroj, troviĝas malgranda urbeto kun ruĝaj tegmentoj sur la malaltaj domoj. En unu el ili super ardantaj karboj kaj en varmega vaporo estis preparataj rimarkindaj aĵoj. Oni kuiris en vitraj glasoj, oni kirlis kaj distilis, en pistujoj oni pistis spicojn. Ĉion gvidis neĵuna sinjoro.

"Oni devas atendi, ĝis venos la ĝusta!" li diris,

"jes, la ĝustan, la veran en ĉio kreita oni devas ekkoni kaj sin teni je tio."

En la ĉambro sidis ĉe la brava patrino du el ŝiaj filoj, ankoraŭ malgrandaj, tamen jam kun disvolvigitaj pensoj. Pri la ĝusto kaj vero parolis al ili ankaŭ la patrino, kaj ankaŭ ke oni devas sin teni je la vero, ke ĝi estas la vizaĝo de Dio en ĉi tiu mondo.

La pli aĝa el la knaboj aspektis petolema kaj kuraĝa, li amis legi pri la fortoj de la naturo, pri la suno kaj la steloj; nenia fabelo ŝajnis al li pli bela. Ho, kia feliĉo kredeble estas, se oni povas veturi por fari malkovrojn, aŭ elpensi, kiamaniere oni povas fari imitaĵon de la flugiloj de birdoj kaj poste havi la eblon flugi! Jes, tio povas esti nomata trovi la ĝuston! La patro estas prava, kaj la patrino estas prava; la vero kunkuntenas la mondon.

La pli juna frato estis pli silentema kaj tute fordonis sin al la libroj. Kiam li legis pri Jakob, ke li kovris sin per felo de kaprido por simili al Esav kaj per tio trompe rabi de li la rajton de unuenaskiteco kaj la benon de lia patro, li kolere pugnigis sian malgrandan manon, plena de indigno kontraŭ la trompinto. Kiam li legis pri tiranoj kaj pri ĉiuj maljustaĵoj kaj malbonaĵoj, kiuj estis farataj en la mondo, tiam larmoj staris en liaj okuloj. La penso pri la justo, pri la vero, kiu nepre devas venki, tute lin okupis. Unu vesperon, kiam la knabo estis jam en la lito, sed la kurtenoj ne estis ankoraŭ tute kuntiritaj kaj la lumo iris ĝis lia lito, li kuŝis kun sia libro kaj legis ankoraŭ ĝis la fino la historion pri Solon.

Kaj liaj pensoj eksvingiĝis kaj portis lin mirinde malproksimen. Ŝajnis al li, ke lia lito aliformiĝis en ŝipon kun plene levitaj veloj. Ĉu li sonĝis, aŭ tio estis io alia? Li glitis super ruliĝanta akvego, super la altaj ondoj de la tempo, li aŭdis la voĉon de Solon. Bone kompreneble kaj tamen fremdlingve sonis la Dana devizo:

"Per leĝo oni devas konstrui landon."

Kaj la genio de la homa raso staris en la malriĉa ĉambro, klinis sin super la lito kaj kisis la frunton de la knabo.

"Fariĝu forta en honoro kaj forta en la bataloj de la vivo. Kun vero en via brusto flugu al la lando de la vero!"

La pli aĝa frato ne estis ankoraŭ en la lito, li staris ĉe la fenestro kaj rigardis la nebulajn figurojn, kiuj leviĝis de la herbejo. Tio ne estis elfaj knabinoj, kiuj tie dancis, kiel iam diris al li maljuna honesta servistino. Li havas jam pli bonajn sciojn pri tio, estis vaporo, kiu estis pli malpeza ol la aero kaj tial leviĝis. Falis falstelo, kaj en la sama momento la pensoj de la knabo leviĝis de la vaporoj de la tero alte supren al la brilanta meteoro. La steloj de la ĉielo brilis, oni havis la impreson, kvazaŭ longaj oraj fadenoj pendis de ili malsupren al la tero.

"Flugu kun mi!"

Io kantis kaj sonis en la koro de la knabo; kaj la potenca genio de la homaj generacioj portis lin pli rapide ol birdo, ol sago, ol ĉio tera, kio povas flugi, eksteren en la senliman universon, kie radioj, irantaj de stelo al stelo, ligis unu kun la alia la korpojn de la universo. Nia tero turniĝadis en la maldensa aero, vilaĝoj aperis dense unu tute apud la alia. Tra la sferoj sonis la vortoj:

"Kio estas proksima, kio estas malproksima, se la potenca genio de la spirito vin levas!"

Kaj ĉiam ankoraŭ la knabo staris ĉe la fenestro kaj rigardis eksteren, la pli juna frato kuŝis en sia lito, la patrino vokis ilin per iliaj nomoj:

"Anders kaj Hans Ĉristian!"

Danujo ilin konas, la mondo konas ambaŭ fratojn - Oersted.

Fonto:

<http://www.kunlaboro.pro.br/esperanto/fabeloj/du-fratoj/>

Vi ankaŭ povas aŭskulti la sondosieron de tiu fabelo se vi iros al la supra retpaĝo.



Tekrar merhaba,

Bu ay da olağan kursumuza devam ediyoruz. Kursumuz çok basit bir kitap olan Avustralyalı G.Gladstone Solomon'un "Esperanto por infanoj" adlı 1934 basımı çok eski bir kitaptan. Her ay bu kitaptan bir ders çalışıyoruz. Bu derslerin sonuna yeni ekler, kelimeler ve dilbilgisi ile ilgili kısa notlar veriyoruz. Eski dergilerinizi atmayın çünkü bu dilbilgisi

açıklamalarını bir kere veriyoruz, sonraki derslerde bunları bildiğinizi varsayıyoruz. Aklınıza takılan bir şey olduğunda önceki sayılara dönüp yaptığımız açıklamaları hatırlamaya çalışın.

Hatırlıyorsanız metin içindeki tirelerin ("") kelime ön ve arka ekleri ile birleşik kelimelerin ana kelimelerini gözle ayırtılabilmek için kullanıldığını söylemiştik. Artık basit ekler (fiil, isim, sıfat vs ekleri) için tire kullanmıyoruz, sadece gerçek ön ve arka ekler ile yeni birleşik kelimeleri ayırıyoruz.

LECIONO PRI "IL"

La proksiman tagon, la instruisto diris al siaj lernantoj la signifon de la sufikso "il" aldonita al vorto.

Ŝi desegnis sur la nigra tabulo kvar belajn bildojn. Rigardu ilin! Ili estas sur la dekstra paĝo.

La unua estas bildo de kudr-ist-ino, kiu kudr-as per kudr-il-o.

La dua estas bildo de ĝarden-isto, kiu fos-as per fos-il-o.

La tria estas bildo de ŝaf-isto, kiu tond-as la lanon de ŝafo per tond-il-o.

La kvara estas bildo de musineto, kiu komb-as sian voston per komb-il-o.

"Vi vidas," diris la instruistino, "ke la sufikso 'il' signifas la objekton, per kiu oni faras ion... Do, ni hak-as per hak-il-o; ni seg-as per seg-il-o; ni faras lini-ojn per lini-il-o. Ĉu vi komprenas tion?"

"Jes, ni komprenas tion," respondis la infanoj.

Tiam la instruistino diris: "Hodiaŭ vi estis tre diligentaj; tial mi diros al vi rakonton."

La infanoj estis ĝojaj! Ili multe amas aŭskulti al rakontoj.

La instruistino komencis:-

"Iam estis tri blindaj musoj..."

"Ĉu ili ne povis vidi?" interrompis Johano.

"Mi diris, ke ili estis blindaj!... Kaj ĉi tiuj tri blindaj musoj..."

"Ĉu ili ne havis okulojn?" denove interrompis Johano.

"Silentu, Johano! Ne interrompu! Vi faras tro da demandoj!... Kaj tiuj tri blindaj musoj ĉiuj kuris post la farmist-edzino."

"Kial ili kuris post la farmist-edzino?" denove interrompis Johano.

"Ho, Johano, ne interrompu tiom!... Kaj la tri blindaj musoj ĉiuj kuris post la farmist-edzino, kaj ŝi fortranĉis iliajn vostojn per la vianda tranĉ-ilo."


Tiam Johano komencis plori.

"Mi ne amas tiun rakonton," diris li, plorante. "Ho! la malbona farmistedzino! La kompat-indaj musoj! Mi malamas tiun rakonton," kaj li ploris laŭte.

"Sed, Johano," diris la maljuna griza musino, "la rakonto ne estas vera. Kaj ĝi estas rakonto, kiun ĉiuj anglaj infanoj lernas. Ĝi estas ankaŭ kanto, kaj la anglaj infanoj kantas ĝin ofte."

"Ĝi estas kanto malbela. Mi neniam kantos ĝin! Neniam, neniam! Mi malamas ĝin."

La kompat-inda knabeto elkuris el la ĉambro, kaj kuris hejm-en, por trovi sian patrinon.



Ekler:

- il- bir kökten alet yaratır
(tranĉi -> tranĉilo = kesmek -> bıçak)
- et- kelimeye küçüklük anlamını verir
- eg- kelimeye büyüklük anlamını verir
- ind- Kelimenin esas anlamına "değer" anlamını katıyor.
(ör. Konserv= saklamak, konservinda=saklamaya değer)

lano	yün
liniilo	cetvel
linio	çizgi
musineto	küçük kız fare
neniam	hiç bir zaman
ofte	sıklıkla
paĝo	sayfa
rakonto	hikaye
rigardi	bakmak
ŝafisto	koyun çobanı, koyun yetiştiricisi
ŝafo	koyun
segi	Kesmek (testere ile)
segilo	testere
signifo	anlam
ŝnuro	ip
ŝnur-ego	halat
snur-eto	ince ip
tial	bundan dolayı
tondi	kesmek (makasla)
tondilo	makas
tro	çok fazla, yeterinden fazla
trovi	bulmak
vera	gerçek
viando	et

Sözlük

aldonita	ilave edilmiş	fosilo	kürek
angla	ingiliz	ĝoja	mutlu, neşeli
aŭskulti	dinlemek	haki	kesmek (balta ile)
blinda	kör	hakilo	balta
desegni	tasarlamak, çizmek	hejmen	eve doğru
elkuri	dışarı koşturmak	interrompi	bölmek
fajro	ateş	kanto	Şarkı
fajr-ŝirm-ilo	ateş korunağı, ateşi engelleyen koruyucu	kapti	yakalamak
farmistedzino	çiftçiyeşi (kadın)	kaptilo	tuzak
farmisto	çiftçi	kombi	taramak
tranĉi	kesmek	kombilo	tarak
fortranĉi	kesip atmak	kompatinda	acımaya değer, zavallı (kişi)
fosi	kürekle kazmak	kudri	dikmek
		kudrilo	dikiş iğnesi
		kudristino	kadın terzi
		kudristo	terzi

Honorigo de LLZ fare de Sejmo


Jen komuniko de Sejmo, la pola parlamento, kiu ĵus, en la 7-a de aprilo, honorigis la memoron de Zamenhof. (Proksimuma traduko, dankon al Johano Pachter)

Lu Wunsch-Rolshoven

La 14a de aprilo 2017 estas la 100a datreveno de la morto de Ludoviko Zamenhof, la kreinto de la internacia lingvo Esperanto.

Ludoviko Zamenhof naskiĝis, kreskis kaj edukiĝis en la medio de multnacia komunumo de Bjalistoko, kiu iĝis por li sopiro por krei internacian lingvon. Li opiniis, ke la homojn dividas antaŭ ĉio lingva baro, kiu kaŭzas konfliktojn kaj miskomprenojn. Li kredis, ke la ideo de Esperanto unuigos ne nur la esperantistojn, sed ke ĝi ekestos la forto unuiganta ĉiujn homojn. La fina versio de Esperanto, konata en la hodiaŭa versio, estis finita de li en 1885. Kune kun la kresko de populareco de lingvo Esperanto Ludoviko Zamenhof kiel ĝia kreinto rifuzis ĉiujn rajtojn por ĝi, transdonante Esperanton al uzo de tuta homaro. Montrante agnoskon de la


kontribuo al ekesto de supernacia lingvo kaj popularigado de ĝi en la mondo, Ludoviko Zamenhof estis en 1905 en Parizo premiita per Ordeno de Honora Legio, kaj en 1913 oni proponis lin kandidato por Nobel-premio. Li mortis la 14an de aprilo 1917.



En 2014 pro decido de Ministro de Kulturo kaj Nacia Heredaĵo la lingvo Esperanto estis enskribita en Polan Liston de Nemateria Kultura Heredaĵo.



<http://www.sejm.gov.pl/sejm8.nsf/komunikat.xsp?documentId=C46335BE3AC0AB56C12580FB0033454D#polityczna.tv>

<http://bialystok.wyborcza.pl/bialystok/7,35241,21607102,sejm-ucznil-przez-aklamacje-pamiec-tworczy-esperanto-ludwika.html>



Elŝutu Amikumu!

nun!



Amikumu ĵus publikiĝis!

iOS:
<https://itunes.apple.com/app/id1214046710>

Android:
<https://play.google.com/store/apps/details?id=com.amikumu.amikumu>

Kapaniŝ - Fermo



Ĝuste bir dergimizin daha sonuna geldik.

Bu sayıda da sizlere önemli okunacak yazılar sunduk. Umarız bir kaçını okumuşsunuz ve dergimiz dilinizin gelişmesine katkıda bulunmuştur.

Sonraki sayımızda buluşmak üzere...

Jen ni estas en al la fino de alia revueto.

Ankaŭ en ĉi tiu numero ni prezentis al vi gravajn kaj legindajn artikolojn. Ni esperas ke vi almenaŭ legis kelkajn de ili kaj nia revueto kontribuis al la pliboniĝo de via lingvo.

Ĝis revido en la venonta numero.

Solvo de la krucvort-enigmo



	O	I	D	E	P	O	R	O		A	10
	R	A	R	E			O	N	I		9
			O	R	O	A	J	O	I		8
			P	O	T	A	R	I	O	K	7
				U	A	G	A	M	O	R	6
				T		L	O	E		D	5
						K	R	E	O	L	4
						R		E	D	A	3
						R	I	S	O	L	2
						M	A	R	P	F	1
										E	12
										O	11
										T	10
										O	9
											8
											7
											6
											5
											4
											3
											2
											1